

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

44a jarkolekto, novembro 2023/11

**BRICS kaj G20:
Kompleksa mozaiko
de internaciaj rilatoj**

**Pinochet ne pravigas
la invadon en Ukrainion**

**Pristudi
la planedon Merkuro
sur kipraj montoj**



FOTO DE LA KOVRILLO: KRISTOF BELLENS / SHUTTERSTOCK.COM

En tiu ĉi numero

el diplomatia vidpunkto

INTERNACIAJ RILATOJ **3**

► BRICS kaj G20:

Kompleksa mozaiko de internaciaj rilatoj

politiko

SUDANO **5**

► Nehavebla daŭra paco

ESEO **8**

► Pinochet ne pravigas la invadon de Ukrainio

INTERNACIAJ RILATOJ **10**

► Pollando kaj Koreio pliamikiĝas per armiloj

NOV-KALEDONIO **12**

► Politiko frostigas la voĉdonantojn

ekonomio

ESEO **14**

► Ĉu etika bankado eblas?

Persona rakonto pri bankfraŭdo

BRICS **16**

► Ambasadaĵ eraroj, kiuj rompas efikon

scienco

DIABETO **17**

► Manĝi bone kaj sin trejni sekure

ITALIO/KIPRO **19**

► Pristudi la planedon Merkuro sur kipraj montoj

eseo

RUSIO **21**

► Ĉu la plej malbona lando por vivi?

libroj

► Spioni kaj esti spionata **24**

► Ne legu tiun libron en trajno, metroo aŭ buso! **25**

► Brutala liberigo de pasinteco **26**

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.be

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 44a jarkolekto; aperas principe la 15an de la antaŭa monato, escepte de aŭgusto.

MONATO havas 64 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 47 landoj kaj abonantojn en 68 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵ artikoloj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; MONATO estas eldonata en tradicia papera versio kaj bite en la formoj PDF, ePub, Kindle kaj en voĉlegita versio; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de la eldonejo.

eldonejo:

Vlaamse Esperantobond v.z.w.
(Flandra Esperanto-Ligo),
Lange Beeldekensstraat 169,
B-2060 Antwerpen, Belgio;
telefono: + 32 3 234 34 00;
retpoŝto: eldonejo@monato.be;
Skype: fel-monato;
BE0419 028 122 -
RPR Antwerpen;
banko: BE66 0000 2653 3843
(BIC-kodo BPOTBEB1).

abontarifo:

La abontarifo varias laŭlande.
Vd. en MONATO 2023/11, p. 28
kaj en monato.be/tarifo.php
aŭ petu ĝin de
eldonejo@monato.be.

retejo: www.monato.be



sociaj retejoj:

X: @RevuoMonato
Facebook: facebook.com/revuo.Monato/
Telegramo: monato.telegram.org
YouTube: www.monato.be/jutubo
Mastodon: @monato
@esperanto.masto.host
Instagram: RevuoMonato

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paŭl Peeraerts.

reviziantoj:

Edmund Grimley Evans, Jens S. Larsen, Frank Merla, Juan Carlos Montero Medina, Rob Moerbeek, Brian Moon, Fransoazo Noireau, Manolo Parra, Andrej Peĉenkin, Anna kaj Mati Pentus, Remuŝ, Antônio W. de Ruyter.

faktokontrolanto:

André Ruyschaert

redakcia sekretario:

Paŭl Peeraerts.

Rete: redakcio@monato.be.

grafiko:

Zep Armentano, Ferriol Macip

redaktoroj:

► **Arto:** Aleksej Salomatinov,
Moskvo, arto@monato.be.

► **Ekonomio:** Roland Rotsaert,
Belgio, ekonomio@monato.be.

► **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.

► **Historio:** Trevor Steele,
Aŭstralio, historio@monato.be.

► **Hobio:** Evgeni Georgiev,
Aŭstrio, hobio@monato.be.

► **Komputado:** Edmund Grimley Evans, Britio,
komputado@monato.be.

► **Leteroj:** Paŭl Peeraerts,
Belgio, leteroj@monato.be.

► **Libroj:** libroj@monato.be.

Noto: Librocenzojn oni ne sendu al la redaktoro propriniciate. La kunlaborantoj ricevos la recenzopetojn kaj la librojn de la eldonejo.

► **Lingvo:** Roberto Pigro,
Kipro, lingvo@monato.be.

► **Literaturo:** Trevor Steele, Aŭstralio, literaturo@monato.be.

► **Medio:** Andrej Peĉenkin,
Rusio, medio@monato.be.

► **Moderna vivo:** Norberto Díaz Guevara, Kubo,
moderna_vivo@monato.be.

► **Politiko:** Massimo Ripani,
Italio, politiko@monato.be.

► **Scienco:** Roberto Pigro,
Kipro, scienco@monato.be.

► **Spirita vivo:** Alberto García Fumero, Kubo,
spirita_vivo@monato.be.

► **Turismo:** Evgeni Georgiev,
Aŭstrio, turismo@monato.be.

Verantw. uitgever: Vlaamse Esperantobond v.z.w.,
Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen.

INTERNACIAJ RILATOJ

BRICS kaj G20: Kompleksa mozaiko de internaciaj rilatoj



Julius HAUSER

korespondanto de MONATO en Slovakio



GLADDER / SHUTTERSTOCK.COM

BRICS estas
mallongigo de la anglaj komenc-
literoj de kvin
landoj: Brazil, Russia,
India, China, South Africa
(Brazilo, Rusio, Barato, Ĉinio,
Sud-Afriko). Ĝi ekzistas
de 2006.

En aŭgusto kaj septembro de ĉi tiu jaro la intereson kaj atenton de la monda publiko, diplomatoj kaj politikologoj vekis du internaciaj pintkunvenoj: la 15a pintkunveno de la BRICS-landoj (22a-24a de aŭgusto, Johanesburgo, Sud-Afriko) kaj la 18a pintkunveno de la 20 plej gravaj industriaj landoj, mallonge G20² (9a-10a de septembro, Nov-Delĥio, Barato), kiu okazis unufoje en Barato. Kio kunigas ĉi tiujn kunvenojn je plej alta nivelo en diversaj partoj de la mondo? Jen kelkaj pripensoj kaj konsideroj.

Plivastigo de BRICS

La ĉeffokuso de la intertraktadoj de kvin landoj estis koncentrita sur la estonteco de la grupiĝo. Estis interkonsentitaj la bazaj principoj de plivastigo de BRICS, kaj ses landoj el tri kontinentoj, specife Argentino, Egiptio, Etiopio, Irano, Saud-Arabio kaj Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj ricevis la inviton membriĝi en BRICS ekde la 1a de januaro 2024³.

Efikeco de plivastigo

Nuntempe estas tro frue paroli pri la efikeco de la vastigita BRICS, ĉar ĝi estas nehomogena grupiĝo. Iuj landoj serĉas en membriĝo en BRICS impulson por sia plua eko-

nomia kresko, pli bonan aliron al investado, pruntoj kaj helpo en krizaj tempoj, aliaj landoj serĉas eliron el la krizoj, kiujn ili travivas. Multo dependos ankaŭ de tio, ĉu la grupiĝo povos kunordiĝi en estonteco, precipe en internaciaj organizaĵoj. Ĉiuokaze, la plivastigo de la grupiĝo ne estas nur simpla politika gesto de nova tutmonda ludanto, ĉar la invito al Irano estas tre forta signalo al la eŭrop-atlantika komunumo.

Se diri simple, BRICS estas en la nuna momento interesa internacia interkonsiliĝa kaj kunordiga platformo. Multaj landoj sentas, ke ili estas forlasataj el altnivela geopolitika decidado, kaj pro tio *konstanta seĝo* en BRICS povas revenigi ilin en la internacian ludon.

Ĉu komuna monsistemo?

Unu el la ĉefaj temoj de la intertraktado de BRICS estis ankaŭ la demando pri reciproka komuna

1. BRICS estas mallongigo de la anglaj komenc-literoj de kvin landoj: *Brazil, Russia, India, China, South Africa* (Brazilo, Rusio, Barato, Ĉinio, Sud-Afriko). Ĝi ekzistas de 2006.

2. G20 estas neformala kuniĝo de 19 ŝtatoj (Aŭstralio, Argentino, Barato, Brazilo, Britio, Ĉinio, Francio, Germanio, Indonezio, Italio, Japanio, Kanado, Meksiko, Rusio, Saud-Arabio, Sud-Afriko, Sud-Koreio, Turkio, Usono) kaj Eŭropa Unio (EU). Ĝi ekzistas de 1999.

3. Laŭ oficialaj informoj de Sud-Afriko, proksimume 40 landoj esprimis sian deziron aliĝi al BRICS kaj pli ol 20 el ili oficiale prezentis peton. Sud-Afriko aliĝis al BRICS kiel lasta en 2010.

monsistemo, sed la kreado de reciproka monsistemo de tiom diversa grupiĝo estas malfacile imagebla. Tamen tio ne signifas, ke la paŝoj faritaj de la grupiĝo en la financa sfero principe ne estos direktitaj al tiu ĉi celo. Laŭ diplomatoj la perspektivo de reciproka komerco en lokaj valutoj estis diskutata antaŭ kaj ĉe la pintkunveno de Johanesburgo. Eble okazos ia interna sen-dolarigo en la grupiĝo, sed al la cetero de la mondo tio verŝajne apenaŭ eblas nuntempe. Tiurilate aprobita 26-paĝa deklaro de BRICS en punkto 45 postulas, ke la ministroj pri financo kaj/aŭ centrabankaj estroj konsideru la temon de lokaj valutoj, paginstrumentoj kaj platformoj, kaj ke oni preparu raporton por la venonta pintkunveno de BRICS, kiu okazos en 2025 en la industria kaj historia urbo Kazano, Rusio.

Transportado kun G20

La pintkunveno de BRICS donis al Barato avantaĝan komencan pozicion por la prioritatoj de ĝia prezidado de G20: subtenon de konstanta membreco de Afrika Unio⁴ (AU) en G20 kaj de intereso de la landoj de la tutmonda Sudo. Barata diplomatio

atingis sukcese la celon, kaj AU fariĝis membro de G20; ĉu do oni povas paroli pri G21 ...?

Tri temaj blokoj

La ĉi-jara pintkunveno de G20 okazis en tri temaj blokoj: *Unu Tero* (ekologia kaj daŭrigebla disvolvado, media sekureco, klimato, energio, nulaj emisioj); *Unu Familio* (inkluziva kresko, daŭrigeblaj celoj, sano, edukado kaj evoluo de la socio sub la gvidado de virinoj) kaj *Unu Estonteco* (cifereca transformo, reformo de multflankaj organizaĵoj). Ĉi tiuj devizoj estas bazitaj sur la frazo *Vasudhaiva Kutumbakam*, kiu aperas en hinduaj tekstoj kaj povas esti libere tradukita kiel *la mondo estas unu familio*.

Ukrainio kaj Rusio: kompromiso

La pintkunvenantoj de G20 adoptis 34-paĝan deklaron. En la enkonduko de la deklaro oni konstatas interalie, ke lige kun la milito en Ukrainio ripetigas la naciaj pozicioj de la landoj kaj la rezolucioj adoptitaj en la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj (UN) kaj la Ĝenerala Asembleo de UN. Do, kompromiso, kiu ne eksplicite kondamnis rusan agreson en Ukrainio kaj kiu poste provokis tre akrajn kritikojn fare de Ukrainio.

Estas interese, ke la prezidento de Ukrainio,

Volodimir Zelenskij, ne estis invitita al la pintkunveno de G20. Ankaŭ la rusia prezidento Putin ne partoprenis la pintkunvenon (li ankaŭ ne ĉeestis en la pintkunveno de BRICS en Johanesburgo) kaj lin anstataŭis la ministro pri eksterlandaj aferoj Sergej Lavrov.

La pintkunvenantoj de G20 ankaŭ laŭdis la klopodon de Turkio renovigi la grenan interkonsenton. Ili emfazis, ke necesas plena, ĝustatempa kaj efika realigo de la iniciato por certigi tujan kaj seninterrompan provizion de greno, manĝaĵoj kaj sterkoj el Ukrainio kaj Rusio. La preamblo finiĝas per mallonga sed forta alvoko: *La hodiaŭa epoko ne estu milita*.

Nova iniciato

La mondgvizantoj prezentis ankaŭ planon por la infrastruktura ligo de Eŭropo kun Mez-Oriento kaj Barato. La celo de ĉi tiu iniciato, kiu direktiĝas al ligado de fervojoj, havenoj, elektro- kaj datum-retoj, estas subteni ekonomiajn rilatojn kaj politikan kunlaboron kaj integri la vastan merkaton de Barato kun okcidentaj landoj.

En la fina deklaro, la gvidantoj ankaŭ promesis protekti vundeblulojn pere de justa kresko kaj plifortigante makroekonomian kaj fincan stabilecon. Ili volas certigi manĝajsekon, kiun kondiĉas la dis-

poneblo de sterkoj kaj investoj en agrikulturo.

La venontaj pintkunvenoj de G20 devus okazi en novembro 2024 en Brazilo kaj en 2025 en Sud-Afriko. Tiel, tri sinsekvaj pintkunvenoj devus esti en la landoj de BRICS, kio povas esti konsiderata ankaŭ kiel diplomatia sukceso de tiu ĉi malgranda grupiĝo.

Fina noto

La deklaro de G20 estas historia kun 100-procenta konsento pri ĉiuj evoluaj kaj geopolitikaj aferoj. Ĝi konfirmas, ke G20 estas la ĉefa forumo por internacia ekonomia kunlaboro kaj ne platformo por solvi geopolitikajn kaj sekurecajn problemojn. Do, ĝi reprezentas unikan diplomatian spacon por interŝanĝo de opinioj, kiun la plej multaj landoj uzas ankaŭ por pliiĝi sian videblecon.

Oni povas nur esperi, ke la konkludoj de la supre menciitaj pintkunvenoj sukcese realiĝos en la praktiko en la konkretaj regionoj de la mondo. Tamen, tio postulas ankaŭ kvalitan ŝanĝon en la pensado de la gvidantoj kaj rekonon de la realeco de la nuna mondo. ■

4. Afrika Unio estas organizaĵo de afrikaj ŝtatoj, kiu havas nuntempe 55 membro-ŝtatojn. Ĝi estas fondita en 2002, anstataŭante la ĝistiaman Organizaĵon por Afrika Unueco.



Julius HAUSER estas emerita ambasadoro de Slovakio



PUNGHI / SHUTTERSTOCK.COM

SUDANO

Nehavebla daŭra paco

Maksat KUDAJBERGEN

En la turbula sudana historio, estas malfacile sekvi la fadenon de eventoj, el kiuj rezultis la nuna interfrata konflikto.

En 2018 la ekonomia krizo en Sudano pligravigis kaj la vivokostoj rapide kreskis. En decembro homoj komencis elmontri sian nekontenton per multmilopaj manifesta-

cioj. En januaro 2019 en la stratoj aperis unuaj postuloj pri forigo de Omar al-Baŝir el la prezidanteco. La armeo, kiu parenteze neniam estis unuiĝinta forto kaj enhavis multajn malamikajn frakciojn, perceptis progresantan malfortiĝon de la prezidanto Baŝir.

En aprilo 2019 la sudana militistaro forigis prezidanton Baŝir, malfondis la parlamenton kaj ĉiujn lokajn elektitajn aŭtoritatojn, suspendis la konstitucion kaj starigis Provizoran Milit-

”

Rapidaj Subtenfortoj (RSF) pafis pacajn manifestaciantojn kaj uzis kontraŭ ili larmigan gason, sed ne sukcesis haltigi la protestojn. Pli ol 100 homoj estis mortigitaj, sed granda protestmovado daŭris

istan Konsilion, kiu anoncis baldaŭan establon de civila registaro. Civilaj opoziciaj grupoj ne fidis la bonajn intencojn de la armeo kaj organizis amasajn sidajn stratkunvenojn. La 3an de julio Rapidaj Subtenfortoj (RSF) pafis pacajn manifestaciantojn kaj uzis kontraŭ ili larmigan gason, sed ne sukcesis haltigi la protestojn. Pli ol 100 homoj estis mortigitaj, sed granda protestmovado daŭris.

La persisteco kaj kuraĝo de la civila opozicio kon-

sentigis la junton starigi tek-
nikan registaron en aŭgusto
2019. La ĉefministro Abd-
alla Hamdok ne havis sufiĉe
da tempo por plani kaj efek-
tivigi ĉiujn necesajn refor-
mojn, antaŭ ol la sekvanta
armea puĉo okazis en okto-
bro 2021. Generalo Abdel
Fatah al-Burhan, estro de la
Sudanaj Militfortoj (SMF),
kaj generalo Mohammad
Hamdan Dagalo, pli konata
kiel Hemedti, estro de RSF,
forigis la civilan registaron,
restarigis la Provizoran
Militistan Konsilion kiel
ĉiopovan junton, kaj inhibis
la demokratigon.

Regi la orminejojn

Ekde la puĉo estis klare,
ke en la lando povas ekzisti
nek du armeoj nek du estr-
aroj. Surface, ambaŭ gene-
raloj promesis senproble-
man transiron al internacie

akceptinda civila registaro,
sed ĉiu el ambaŭ gvidantoj
batalis por forpuŝi la kon-
traŭulon kaj atingi plenan
regadon pri enspezoj, pre-
cipe el orminejoj. La aliaj
landoj rekonas Burhan kiel
la solan sudanan ŝtatestron,
dum Hemedti plifortiĝis
sendante sudanan oron al
Rusio kaj hejme uzante
servojn de la fifama grupo
Wagner, tiel longe kiel tiuj
servoj estis atingeblaj.

Malfermita batalkampoj

La 15an de aprilo oka-
zis tio, kion ĉiuj timis:
RSF atakis tutlande la
trupojn de SMF, sango-
plena bataloj daŭris en
Ĥartumo ĉe la prezidant-
palaco, la ĉefflughaveno
kaj ĉiuj pontoj. Tiam la
trupoj de Hemedti kap-
tis ĉirkaŭ 200 familianojn
de Burhan kaj lian plej

proksiman kunlaboranton
Kabbaŝi. Ili ĝis nun ostaĝas
en barakaro de RSF. Burhan
kontraŭis armean konflik-
ton kaj preferis atingi siajn
politikajn celojn senmilit-
e. Li ne oponus, se tio estus
bezonata, peti diplomatan
subtenon el proksimaj kaj
malproksimaj partneroj. Li
lasis armitan aktivadon en
la manoj de sia viculo Kab-
baŝi, kiu decidiĝis favore al
senĉesaj atakoj kontraŭ la
malamikaj barakoj, eĉ se tie
estas kaptitaj la propraj fa-
milianoj. Ilia ĉefa malamiko
Hemedti estis grave vundita
en majo, sekve la veran or-
donpovon en RSF havas lia
frato Abdel Rahim.

Homŝildoj

RSF estas sperta en strat-
batalado kaj ĝi sukcesas en
urbaj medioj. Ĉi tiu armeo
devenas el la multe sufer-

inta Darfuro, kie signifa par-
to de la loka popolo sentas
sin neglektata de la aŭtorit-
atoj en Ĥartumo. Tio kon-
dukas al plia krueleco kaj
malvirteco de la RSF-solda-
toj kontraŭ la loĝantoj de la
ĉefurbo. RSF uzas ilin kiel
homŝildojn, lokante taĉ-
mentojn en loĝkonstruaĵoj,
lernejoj kaj malsanulejoj.
La prezidantaj taĉmentoj
havas nombran superecon
kaj regas la aeron, kio ebl-
igas inhibi kaj lastatempe eĉ
forpeli la kontraŭajn fortojn
en la regionoj. SMF estas pli
multnombra, ĉar ĝi povas
rekrutigi junulojn preskaŭ
el la tuta lando, kvankam
mankas al ili taŭgaj trejnado
kaj instigo.

Sauda Arabio, Etiopio aŭ Afrika Unio

Ambaŭ generaloj forte
kredis je sia propra venko
kaj celis plene detruadi la
kontraŭulon. Tio signifas,
ke batalhaltoj kaj militpaŭ-
zoj komence estis nur sim-
bolaj agoj, farataj por plaĉi
al tiamaj fortaj partneroj,
kiel Sauda Arabio, Etiopio
aŭ Afrika Unio, kiuj pe-
nas fini la interfratan mili-
ton. Samtempe, nek SMF
nek RSF deziris komenci
efikajn pripacajn inter-
parolojn. Ili kritike parto-
prenis, aŭ pli precize ĉeestis,
tri pacprocezojn. La unu-
an, en sud-sudana Ĝubao,
aranĝis Usono kun Sauda
Arabio, celante efikan batal-
halton. La duan komencis
la Interregistara Aŭtorita-
to pri Disvolviĝo (IGAD),

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

lkk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Ionel Onet,
Mikaelo Bronŝtejn, Laŭrenco Septier, Mao Zifu,
Jopetro Danvy, Gennadij Turkov, Russ Williams,
Stéphan Brault, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil,
Lilia Ledon, N. Xil Carvalho,
Robert Molimard, Claude Gerlat,
Trevor Steele, Ian Fantom ktp.

Abono: 27,50 € (ekde 16 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp



kiu invitis la prezidantojn de Etiopio, Ĝibutio, Kenjo kaj Sud-Sudano okazigi interparoladojn kun ambaŭ flankoj de la fratmilito. La tria estis devigita agado de Afrika Unio, kiun multaj afrikaj landoj kritikis pro ĝia pasiva pozicio rilate al la konflikto en Sudano.

Neniu atingis superecon

Post kelkaj semajnoj de senĉesaj bataloj, neniu el la flankoj atingis klare esprimeblan superecon. RSF regas la plejparton de la ĉefurbo kaj ĝiajn enveturvojojn. Ekster Ĥartumo, Hemedti sekuriĝis en la kelkaj sud-okcidentaj sudanaj regionoj, inkluzive de Darfuro. Ĉi tie liaj trupoj malhelpas la ĉiutagan laboron de la ŝtatinstitucioj, prirabadas la popolon, kaj senjuĝe mortigas ĉiujn, kiujn ili suspektas pri kontraŭsinteno. La 15an de junio, „nekonataj krimuloj” kaptis kaj brutale ekzekutis Ĥamis Abbakar, la guberniestron de la provinco Okcidenta Darfuro. Kelkajn tagojn antaŭe, Abbakar en televida intervjuo priskribis la situacion en la provinca ĉefurbo El Geneina kiel „ĉiaman invadon de armitaj bandoj”. Loka komandanto de RSF-taĉmentoj fanfaronis en amaskomunikiloj pri la videaĵo pri tiu kruela mortigo. Pli malbone estas, ke la nuna milito denove flamigas iaman konflikton inter lokaj arabaj kaj ne-arabaj, sed ankaŭ islamaj, tri-

”

Ekde la puĉo estis klare, ke en la lando povas ekzisti nek du armeoj nek du estraroj

”

La nuna milito denove flamigas iaman konflikton inter lokaj arabaj kaj ne-arabaj, sed ankaŭ islamaj, triboj

”

La milito puŝis milojn da homoj rifuĝi en najbaraj landoj. 250 000 venis al Egiptio, formante kilometrolongajn vicojn ĉe la landlimo

”

Neniu el la flankoj kapablas atingi venkon, almenaŭ en proksima estonteco, sekve la milito daŭros

boj. Estroj de la afrika tribo Dar Masalit informis, ke en aprilo, majo kaj junio armitaj grupoj de arabaj nomadoj, proksimeigitaj al Hemedti, multfoje invadis El Geneina, mortigante 5000 homojn, prirabante registarajn kaj internaciajn oficejojn, detruante multajn konstruaĵojn kaj historiajn monumentojn. Pli ol 400 000 homoj forkuris al landlimaj regionoj en Ĉado.

Aktuala disvolviĝo

Ĉirkaŭ tri kvaronoj de la lando estas sekuraj en la manoj de la registaro. Generalo Burĥan kaj liaj staboficioj verŝajne komence troviĝis en unu el la ĉefurbaj distriktoj, kiuj estas sieĝataj de la Rapidaj Subtenfortoj. La situacio similis en multaj aliaj urboj, kie kelkajn ĉefinstituciojn regis la registara armeo, sed la plimulton de la urbo okupis RSF. Oftaj batalhaltoj, se respektataj, ne ŝanĝis la potencekvilibron, sed almenaŭ donis ripozon al la loĝantoj. Tamen en aŭgusto la prezidanta armeo atingis certajn sukcesojn sur batalkampoj, RSF estis forpremita el multaj urboj, kelkaj regionoj tute trankviligis. Burĥan sentis sin sufiĉe forta por forlasi sian kaŝitan ŝirmejon kaj viziti fidelajn taĉmentojn en aliaj urboj. Serĉante potencajn partnerojn, li veturis al sud-sudana Ĝubo, egipta Kairo kaj katar Doho. Burĥan kredas je sia supereco kaj volas, ke iu sidigu estron Hemedti ĉe la interparola tablo.

Sufero por la civiluloj

La milito puŝis milojn da homoj rifuĝi en najbaraj landoj. 250 000 venis al Egiptio, formante kilometrolongajn vicojn ĉe la landlimo, aliaj penis eniri Ĉadon, Etiopion, eĉ Centrafrikon, kie la sekureca situacio estas tre malbona. Ĉirkaŭ 360 000 sud-sudananoj, kiuj loĝis en rifuĝejoj en la suda parto de Sudano, fluis reen al Sud-Sudano. Ĉiuj tiuj landoj mem ne kapablas provizi alvenantajn homojn per ŝirmejo kaj manĝaĵo. Ili baldaŭ alfrontos malsaton kaj pliiĝon de internaj socistreciĝoj. La neevitebla sekvo estas regiona politika malstabileco kaj dolora sufero por miloj da homoj.

Kio okazos?

Malgraŭ la esperoj de Burĥan, neniu el la flankoj kapablas atingi venkon, almenaŭ en proksima estonteco, sekve la milito daŭros. La agrikulturo kaj la industrio, krom la RSF-regataj orminejoj, ĉesos produkti, ŝtatinstitucioj ne funkcios, la tuta lando dependos de internaciaj bonfaraĵoj. Aldona danĝero estas la separismaj inklinoj, kiuj iomete trankviligis dum la post-Baŝira tempo, sed facile reviviĝas en militcirkonstancoj. Jam aktiviĝis movadoj en regionoj Kurdufano, Darfuro kaj Blua Nilo, kiuj celas atingi sendependecon disde Ĥartumo. Ĥaoso kaj sufero ree regos la regionon. ■



ESEO

EURONEWS

Kandeloj bruligitaj en la Nacia Stadiono por memori la malaperintojn dum la diktaturo.

Pinochet ne pravigas la invadon en Ukrainio



Leonardo Araya

korespondanto de MONATO en Ĉilio

La 11an de septembro Ĉilio memorigis la 50an fojon la puĉon de 1973, kiu faligis la registaron de Salvador Allende [salvador ajende], socialisto, kiu regis Ĉilion ekde 1970. Post la puĉo militistaro, gvidata

de la diktatoro Augusto Pinochet [aŭgusto pinoĉet], regis Ĉilion ĝis 1990.

La puĉo havis multajn motivojn, sed por kompreni ilin, oni komprenu la politikan situacion de Ĉilio dum la 1970aj jaroj, en kiuj Ĉilio travivis la plej mal-

bonan politikan dividon de sia historio. Kompreni puĉon povas ankaŭ helpi kompreni aliajn situaciojn en la mondo.

La puĉo en Ĉilio

Kiam Allende estis demokrate elektita de la ĉilia

parlamento en 1970, Ĉilio iĝis rapide minaco por la interesoj de Usono en Sud-Ameriko. Antaŭ Allende Ĉilio estis lando, kiu estis aliancano de Usono, ekzemple por kontraŭstari la influon de Kubo en maldekstraj movadoj en Ameriko aŭ

por partopreni en la Alianco por la Progreso, antaŭenigata de Usono en 1961 por havi pli bonajn rilatojn kun landoj de la regiono.

Sed la registaro de Allende sekvis politikon kontraŭ Usono. Ekzemple en 1971 la ĉilia parlamento aprobis la plenan ŝtatigon de ĉilia kupro. Poste la registaro ekspropietigis minejojn (kiel *Chuquicamata*) de usonaj korporacioj kiel *Anaconda Copper*, kaj la ŝtata korporacio *Codelco* alproprigis ilin.

Dum la malvarma milito la apudesto de demokrata maldekstra registaro en Ĉilio signifis danĝeron por Usono, nome ke aliaj sudamerikaj landoj alproksimiĝos al Sovetio. Pro tio Usono uzis sian influon por provi fali la registaron de Allende. Ĝi laboris por malstabiligi la ĉilian registaron, ekzemple per ekonomia subtenado de la konkurantoj de la maldekstra registaro, per subtenado de teroristoj, kiuj murdis generalon René Schneider [rené ŝnajder], kiu opoziciis la ideon de puĉo kontraŭ Allende. Ĝi krome subtenis la dekstran gazetaron kiel la ĵurnalon *El Mercurio*, financis la strikon de la kaminonposedantoj de 1972 por damaĝi la nacian ekonomion kaj toleris planojn de puĉo de ĉiliaj oficistoj antaŭ la 11a de septembro 1973.

Kiel sekvo, la ĉilia prezidanta palaco estis atakita per aviadiloj kaj tankoj, Allende mortigis sin, kaj

komenciĝis regado de militistoj, kiu daŭris 17 jarojn. Tiel Ĉilio travivis malluman epokon, en kiu homaj rajtoj estis kutime malrespektataj, kaj politikaj disidentoj al la diktaturo estis subpremataj per torturo, malaperigo kaj murdo.

La influo de superpotencoj

Unu el la plej grandaj kaŭzoj de la puĉo kaj diktaturo en Ĉilio estis la agado de superpotencoj, precipe Usono, kiu opiniis, ke registaro, kiuj kontraŭstaras ĝin en ĝia influregiono, signifas rektan danĝeron por ĝia nacia sekureco, kaj do pravigis ĉiajn agadojn necesajn por fali tiujn registarojn.

Necesa memorigo


Nun la vundoj de la invado en Ukrainion kreskas konstante tie. Sed Ĉilio laboras malfacile por kuraci la vundojn, kiujn kaŭzis la puĉo kaj la diktaturo. La 11an de septembro la tuta lando membris la abomenaĵojn kontraŭ homoj dividitaj per malamo kaj politikaj partioj. En la memoraĵo de *Estadio Nacional*, stadiono, kiu funkciis kiel enfermejo por politikaj arestitoj dum 1973, homoj povis memori kaj renovigi siajn kunligojn kun demokratio kaj pacifismo.

La samo okazas en Ukrainio

Estas malĝojige, ke nun ni povas vidi la saman situacion aliloke en la mondo. Ekzemple, kiam Rusio ekokupis Krimeon en 2014 kaj invadis Ukrainion en 2022 por protekti siajn proprajn interesojn en sia influregiono. Kiam aperas registaro, kiu opozicias superpotencon en lando de sia influ-regiono, la potenco timas pri sia sekureco kaj ofte pensas, ke opozicio de unu lando estas verko de alia malamika superpotenco. Nun, en 2023, inter NATO kaj Rusio, kaj antaŭe, en 1973, inter Usono kaj Sovetio.

Ni devas memori eventojn kiel la puĉo de 1973, ĉar tiel ni povas lerni pri la kialoj, kiujn superpotencoj ofte uzas por interveni en internajn aferojn de aliaj landoj. Ofte ni povas fari nenion por malhelpi tiujn epizodojn, sed ni devas kompreni, ke perceptata danĝero en regiono de invado ne pravigas invadojn kaj puĉojn, koncepto, kiun ne ĉiuj kunhavas hodiaŭ.

La perforto kaj hororo de la puĉo kaj la diktaturo estas pli gravaj ol iam ajn, kiam Ĉilio kaj aliaj landoj de la regiono kaj la mondo



ANTONIO LARREA

*Caminando, caminando
voy buscando libertad,
ojalá encuentre camino
para seguir caminando.*

Teksto el kanto de Víctor Jara, aktivulo por la registaro de Salvador Allende, murdita dum la puĉo de 1973. „Mi iras, iras por serĉi liberecon, mi esperas trovi vojon, por daŭre iri.”

travivas krizojn, en kiuj ofte kruelego aperas kiel solvo por multaj problemoj. Eĉ en Ĉilio ankoraŭ estas multaj, kiuj pensas, ke diktaturo estas necesa por protekti la nacian sekurecon kontraŭ armitaj maldekstraj movadoj, kaj aliaj pensas, ke simila aŭtoritatisma registaro estas necesa por lukti kontraŭ krimaj organizaĵoj kaj drogŝakristoj. Ni devas alceli solvojn, kiuj respektas la rajtojn de ĉiuj homoj. ■



Leonardo ARAYA
estas
studento pri
sociologio.

INTERNACIAJ RILATOJ

Pollando kaj Koreio pliamikiĝas per armiloj



Cho Sung Ho
korespondanto de MONATO en Koreio



En julio 2022 la pola ministerio pri defendado interkonsentis kun Korea Respubliko grand-skale enkonduki koreajn armilojn en sian landon. La listo inkludas 980 tankojn (K2), 670 mempropulsajn kanonojn (K9), 48 malpezajn ĉasaviadilojn (FA-50) kaj 300 multoblajn raketo-lanĉilojn (K239). La elspezata sumo en la jaroj 2022-2023 superos 28 miliardojn da eŭroj.

Enkonduko de armiloj

La pola ministro pri defendado Mariusz Blaszczak diris, ke ĝi estas la plej ampleksa kaj grava el la lastatempaj kontraktoj

pri armiloj, emfazante, ke Pollando bezonas armi sin senprokraste. Pollando provizis Ukrainion per granda nombro da tankoj kaj mempropulsa artilerio, kaj rezulte formiĝis vakuo en ĝia loĝistiko, ĉar Usono kaj NATO ne kapablis rapide plenigi la breĉon.

Por Koreio la transakcio markas la unuan eksporton de tankoj al iu ajn lando kaj de malpezaj ĉasaviadiloj al Eŭropo. Fakte la plimulto de la armiloj enkondukotaj produktiĝos en Pollando. El la 980 K2-tankoj, 180 estos liveritaj el Koreio, dum la ceteraj produktiĝos enlande ekde 2026. La pola modelo nomata K2PL ekipiĝos per plibonigitaj aparatoj. Simile plimulto de la mempro-



La korea prezidento Yoon Seok-yeol vizitis Varsovion, kaj kun la pola prezidento Andrzej Duda rekonfirmis la valoron de la strategia partnereco inter Pollando kaj Korea Respubliko

pulsaj kanonoj produktiĝos enlande. Varsovio tiel volas esti kapabla provizi aliajn landojn de NATO per armiloj enlande produktitaj.

Koreio deziras partopreni ankaŭ la projekton Orka, per kiu Pollando planas havigi al sia mararmeo kelkajn submarŝipojn, kiuj anstataŭos ĝian ununuran. Militfakuloj rigardas la korean modelon KSS-III plej alloga kandidato. La pola prezidento Andrzej Duda mem vizitis la ekspozician halon de ĝia produktanto Hanwha kaj montris sian intereson pri MSPO¹ 2023.

1. MSPO estas internacia defend-industria ekspozicio okazigata ĉiujare en Pollando. Koreio partoprenis kiel la gvida lando en 2023.



La pola prezidento Andrzej Duda montras sian intereson pri la korea submarŝipo KSS-III en la ekspozicia halo de Hanwha de MSPO 2023.

Plifortigi partnerecon

La enkonduko de koreaj armiloj en Pollandon ne estas tute abrupta okazaĵo por ambaŭ landoj. Jam en 2013 Pollando, kiel unua inter la mez- kaj orient-eŭropaj regnoj, establis strategian partnerecon kun Koreio, el kio sekvis rapida disvolvigo de kunlaborado inter la du landoj. Koreio fariĝis unu el la ŝlosilaj investantoj en Pollando, kaj la duflanka komerco en 2022 atingis pli ol 8 miliardojn da eŭroj. Dekoj da koreaj industriaj aŭ komercaj kompanioj funkcias diversloke tra Pollando.

En julio 2023 la korea prezidento Yoon Seok-yeol vizitis Varsovion, ĉeestinte

la NATO-pintkunvenon² en Litovio, kaj kun la prezidento Duda rekonfirmis la valoron de esenca partnereco inter la du landoj. Dum lia vizito 33 novaj intencdeklaracioj estis subskribitaj en kampoj kiel baterioj, robotoj, aviadiloj, atomcentraloj kaj interŝanĝo de homforto.

La tagordo enhavis ankaŭ diskuton pri la postmilita Ukrainio tial, ke antaŭvideble Varsovio rolos kiel la poluso de ĝiaj rekonstruaj projektoj. Efektive la itinero de la prezidento Yoon inkludis sekretan viziton al Kijivo kaj pintkun-

2. Koreio duafoje partoprenis la pintkunvenon de NATO kiel unu el ĝiaj partneroj (AP4). Aliaj partneraj landoj estas Japanio, Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

venon kun la ukraina prezidento Volodimir Zelenskij, kiu petis partoprenon de Koreio en la rekonstruado de sia lando.

Kulturaj interŝanĝoj

La alproksimiĝo de la du geografie malproksimaj landoj ne limiĝas al la industriaj kaj militaj kampoj. En 2010 starigis korea kulturcentro en Varsovio, kaj en 2024 Pollando malfermos la sian en Seulo, kio stimulos viglajn kulturajn interŝanĝojn.

La plej grava kultura evento, en kiu kunplektiĝis ambaŭ landoj, sendube estis la prestiĝa pianokonkurso Chopin 2015. La korea virtuozo Cho Seong-jin laŭreatiĝis per la unua pre-

mio, kaj multaj gejunuloj ekinteresiĝis pri la lando de Chopin. Alia grava, freŝdata evento estis la K-popa³ festivalo, kiu altiris al la stadiono PGE Narodowy en Varsovio pli ol 50 000 fanatikulojn el Pollando kaj najbaraj landoj. Ĝi estis primera grandskala K-popa koncerto en orienta Eŭropo. ■

3. K-popo estas furora korea popmuziko.



CHO Sung Ho

estas emerita profesoro pri biologio kaj aktivis en la movado interalie kiel ĉefredaktoro de la gazeto *La Espero el Koreio* kaj kiel vicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio.

NOV-KALÉDONIO

Politiko frostigas la voĉdonantojn

Christian **FABOSSOU**

korespondanto de MONATO en Francio



DICOM-MI

„Ĉu vi volas, ke Nov-Kaledonio akiru plenan suverenecon kaj sendependiĝu?” Ĉi tio estis la demando prezentita la 21an de decembro 2021 al la balotantoj de Nov-Kaledonio, en tria referendumo pri la institucia estonteco de ĉi tiu franca teritorio en Pacifiko. Malgraŭ tio, ke 96,50 % de la voĉdonantoj respondis „ne”, la lojaluloj havis nur modestan triumfon. La separistoj, kiuj deklaris bojkoton kontraŭ ĉi tiu tria referendumo, kontestas ĝian legitimecon. Pli ol 20 jarojn post la interkonsento de Nouméa, kiu devus pace gvidi ĉi tiun teritorion al nova statuso, Nov-Kaledonio denove estas en politika kaj institucia senelirejo.

Provizora statuso

La franca teritorio Nov-Kaledonio ĝuas specialan, sed provizoran, statuson, rezultantan de la Interkonsento de Nouméa de 1998. Ĉi tiu interkonsento, subskribita inter la franca ŝtato, la lojaluloj kaj la separistoj, antaŭvidas la translokadon de multaj ŝtataj kompetentoj al la insularo, escepte de suverenaj prerogativoj: defendo, justeco, sekureco ktp.

Vojo al referendumo

En 1988 okazis perfortoj en tiu ĉi regiono pro la sendependiĝopeto. Tial la sendependistoj, la lojaluloj

kaj la franca ŝtato donis al si dek jarojn por labori pri la ekonomia, politika, socia kaj kultura disvolviĝo de la insularo antaŭ la organizado de referendumo pri sendependeco en 1998. Sed en 1998 la interkonsento de Nouméa prokrastis ĉi tiun referendumon ĝis inter 2014 kaj 2018, kondiĉe, ke ĝin povu sekvi du aliaj referendumoj okaze de malakcepta rezulto en la unuaj du.

Malkoloniado

La intereso de la estonteco de ĉi tiu teritorio estas kompleksaj kaj transiras la kadron de simpla procezo de malkoloniado.

Francio ne hastas vidi la sendependigon de la insularo, ĉar Nov-Kaledonio estas, unuflanke, unu el la teritorioj, kiuj havigas al ĝi ĉeston en ĉi tiu hind-pacifika zono, nova gravitocentro de internaciaj rilatoj kaj streĉitecoj. La strategia graveco de tiu ĉi teritorio por la franca ŝtato kuŝas ankaŭ en tio, ke ĝia subgrundo koncentras preskaŭ kvaronon de la mondaj nikelrezervoj. Ĉinio ne eraras, diskrete subtenante aŭtonomismajn ambiciojn.

Frostigita balotantaro

Parizo povas kalkuli je la fideluloj rilate al la dorna demando malfrostigi la

balotantaron de la insularo. Por kompensi la demografian malfortecon de la indiĝenoj precipe kanakoj sur sia propra teritorio la interkonsento de Nouméa frostigis la balotantaron ekde 1998. Alivorte, por voĉdoni vi devas esti loĝanto de Nov-Kaledonio inter 1988 kaj 1998 aŭ esti posteulo de gepatro, kiu plenumis tiun kondiĉon. Konsekvenco: pli ol 40 000 loĝantoj estas senigitaj je la voĉdonrajto en ĉiuj lokaj balotoj, eĉ se ili laboras kaj loĝas sur la insularo jam delonge.

La lojaluloj opinias, ke ĉi tiu dispozicio de la interkonsento de Nouméa estas nula pro la jesa voĉ-



Kaledonianoj protestas en la ĉefurbo por pli da sendependeco.

dono en la lasta referendumo. Eĉ se la franca ekzekutivo ne estas favora al ĝenerala malfermo de la elektantaro, ĝi deziras trovi interkonsenton kun la separatistoj por malfrostigi la balotantaron. „Ni ne alvokos la kaledonianajn balotantojn al la provincaj elektoj kun limigita balotantaro”, diris Gerald Darmanin, la ministro pri internaj aferoj, vizitante la insularon en marto 2023.

Dua ludkarto de Parizo

La politika situacio en Nov-Kaledonio estas des pli nedisigebla, pro tio ke la sendependeca tendaro ne parolas per unu sama voĉo. Iuj timas, ke la sendepend-

eca aventuro faligos ilian vivnivelon, kaj ne serĉas radikalman rompon kun la metropolo. Tie kuŝas la dua ludkarto de Parizo. Francio daŭre liveras grandan parton de la sociaj elspezoj de la insularo. La elspezoj kaj financaj kontribuoj de la franca ŝtato reprezentas unu el la ĉefaj financaj rimedoj de la teritorio, kies ekonomia situacio malboniĝas de jaro al jaro. La metropolo devis doni prunton de 175 milionoj da eŭroj al la insularo en 2022, ĉar pro la troaj ŝuldoj tiu ĉi ne plu havas pruntkapablon en la financaj merkatoj.

”

La intereso de la estonteco de Nov-Kaledonio estas kompleksaj kaj transiras la kadron de simpla procezo de malkoloniado

Malavareco kritikata

En kontinenta Francio, voĉoj komencas kritiki la malavarecon de la ŝtato, precipe ĉar la ekspluatado de la mineralaj resursoj de la insularo estas, ekde 2000, ekskluziva kompetento de Nov-Kaledonio kaj ne de la franca ŝtato. Sed iuj kredas, ke ĉi tio estas paginda prezo por la ĉeesto en Pacifiko. La granda demando estas do: ĝis kiam ĉi tiu situacio daŭros? Laŭ la franca prezidanto interkonsento povus esti subskribita antaŭ la fino de 2023 inter ĉiuj partioj koncernataj de la institucia estonteco de la insularo. Sed nenio iĝis publika pri la enhavo de ĉi tiu estonta interkonsento. ■

ESEO

Ĉu etika bankado eblas?

Persona rakonto pri bankfraŭdo

Xavi **ALCALDE**

korespondanto de MONATO en Barcelono



*La antaŭa
ĉefoficejo de
Triodos en Zeist,
Nederlando.*

WOUTER HAGENS / WIKIMEDIA COMMONS

La plimulto el ni vivas en kapitalisma sistemo, en kiu la ĉefa vivcelo estas gajni monon. Ju pli da mono, des pli bone. La pasintan semestron, usonaj studentoj (kiuj studas por iĝi kuracistoj) diris al mi, ke ili estas terurataj de la vivstilo de la barcelonanoj. „Homoj neniam laboras ĉi tie!”, ili diris. Mi provis klarigi al ili, ke ĉi tie oni laboregas, sed provas ekvilibrigi laboron kun libertempo kaj socia vivo. Konsiderante, ke la temperaturo (almenaŭ ĝis la klimata krizo) moderas kaj agrablas, kaj ke la suno

oftas ĉe ni, normalas fini la labortagon sur trinkeja teraso. Gravas zorgi pri rilatoj kun familianoj kaj amikoj, interalie por teni mensan sanon.

Rafinitaj anoncoj anstataŭ etiko

Sed ni revenu al nia rakonto. Ni vivas en kapitalisma sistemo. La celo de (plej multaj) homoj estas havi monon. Simile, la celo de firmaoj estas gajni monon – ĉi tie troveblas eĉ malpli da esceptoj. Inter la firmaoj, bankoj estas klaraj ekzemploj pri tio. Ili laboras

per mono por multobligi ĝin. Ne ekzistas alia (vera) celo por ili. Kiam ili dezajnas siajn reklamajn kampanjojn, kiam iliaj dungitoj klopodas vendi iliajn financajn produktojn, ili faras tion per rafinitaj merkatakaj anoncoj, provante konstrui fidon kaj eĉ ion proksiman al amikaj rilatoj kun siaj klientoj. En ĉi tiu kadro, etiko havas pli ambiguan signifon ol tiun, kiun ni lernis en la lernejo. Bankoj investas regule en industrioj respondecaj pri gravaj homaraj defioj, kiel militoj aŭ la klimata krizo; krome, ili estas esencaj en la strategioj

pri monlavado de drog- kaj hom-ŝakrado.

Ŝparantoj ekpensas pri siaj investoj

De pluraj jaroj, iom populariĝis (almenaŭ en Eŭropo, mi ne konas la situacion en aliaj mondopartoj) la ideo, ke ni devas esti koheraj pri niaj ideoj, ankaŭ en la financa kampo. Ekzemple, se ni ne volas, ke estu militoj, ne havas sencon deponi niajn ŝparaĵojn en banko, kiu investas en armilfirmaoj. Sed ni vivas en kapitalisma sistemo, en kiu la bankoj celas havigi al si kiel eble plej

multe da profito, kaj ili faras ĉion eblan por atingi tion – ĉio ne estas troigo. Ĉu ekzistas esceptoj? Ĉu etikaj financoj eblas? Teorie, jes. La plej grava suverena riĉaĵ-fonduso en la mondo ne estas tiu de Ĉinio, nek tiu de Usono, nek tiuj de la landoj de la Persa Golfo, sed tiu de Norvegio. Kaj ĝi funkcias surbaze de striktaj etikaj kriterioj, kiuj interalie malhelpas al ĝi investi en firmaoj fabrikantaj armilojn, ĉerpantaj fosiliajn rimedojn aŭ kunlaborantaj kun la israelaj setlejoj, kiuj kontraŭleĝe kolonias Cisjordanion. Ĉu temas pri escepto aŭ pri modelo sekvebla/inda de aliaj investo-fondusoj?

Alia menciinda ekzemplo estas tiu de la nederlanda banko *Triodos*, kiu estas ankaŭ regata de etikaj principoj, similaj al tiuj menciitaj pri la norvega fonduso. Krome, ĝi faciligas kreditojn al solidarecaj projektoj kaj al tiuj rilataj al renovigeblaj energioj. Por idealismaj homoj, kiuj sukcesis havi kelkajn ŝparaĵojn, ĝi signifas la solvon de niaj etikaj dilemoj: se ni deponas nian monon en *Triodos*, ni ne nur tenas ĝin sekura, sed per ĝi ni helpas krei pli justan, pli pacan, pli egalecan kaj pli daŭrigeblan mondon. Mi memoras, ke kiam mi laboris ĉe Internacia Kataluna Instituto por Paco, oficisto de *Triodos* informigis pri aferoj pri paco kaj petis min sendadi al ŝi informojn pri nia agado. Kaj mi tion faris, kompreneble.

Iumaniere, ĉi tiu knabino konstruis fidrilaton inter ni aŭ eĉ ion proksiman al amikeco.

Ekde 2008, kiam eksplodis la tiama financa krizo, maletikaj bankaj praktikoj komencis iĝi publikaj. Pro ili, miloj kaj miloj da familioj perdis siajn ŝparaĵojn. En la hispana kunteksto – la sola, kiun mi konas – ĉiuj ĉefaj bankoj partoprenis la fraŭdojn. Denove, la vorto „ĉiuj” ne estas troigo. Ili konscie vendis kompleksajn, altriskajn financajn produktojn al homoj, kiuj ilin ne komprenis. Ofte temis pri maljunuloj, konsilitaj de „tiu simpatia ulo de la banko”. Estis amaso da skandaloj. Evidentiĝis, ke bankoj kapablas fari ion ajn por plialtigi siajn ekonomiajn profitojn, inkluzive de fraŭdo al siaj klientoj. Ekde tiam sennombraj juĝaj decidoj nuligis kontraktojn pri ĉi tiuj specoj de produktoj kaj devigis bankojn redoni la monon al siaj klientoj.

Triodos: etika banko kondutas maletike

Malgraŭ tio, ke la ĉefaj bankoj en Hispanio partoprenis en tiaj misuzaj praktikoj, bonŝance mi ne apartenis al la tiamaj viktimoj. Malfacilas al normala banko krei fidan rilaton kun mi, ĉar mi ĉiam suspektas iliajn intencojn. Mi interalie instruas universitatan kurson nomatan Komerca Etiko (*Business Ethics*) kaj mi konscias pri la kvanto

da fraŭdoj, kiujn kompanioj kaj bankoj efektivas ĉiutage. Kaj fakte, por eviti ajnan fraŭdon, mi havas miajn (ne multajn) ŝparaĵojn en *Triodos*, nome etika banko, kiu evidente ne plenumas trompajn praktikojn. Aŭ tiel mi pensis.

Ekde 2020 denove dekoj da miloj da homoj estis trafataj de banka skandalo; ĉi-foje, io (hispane) nomata CDA (*Certificados de Depósito de Acciones*)¹. Nun ŝajnas, ke temis pri kompleksa, altriska financa produkto (laŭ fakaj advokatoj, tre simila al tiuj fraŭdaj menciitaj antaŭe), kiun tamen oni ne prezentis tiel. Se ni sciis tion antaŭe, ni neniam investus en ĝi. Sed ni tion faris laŭ konsilo de amika kaj helpema oficisto de *Triodos*. Oni klarigis al ni, ke ĝi estas sekura, stabila, kaj ekster financa spekulado. Alivorte, ke ne temas pri vera investo, sed pri ŝparado. Kaj ke ĝi utilis por la realigo de sociaj projektoj, respektamaj al la medio, kaj de socia kaj daŭrigebla ekonomio.

Banko profitas, CDA-posedantoj perdas

Hodiaŭ tiuj CDA-oj perdis grandan parton de

sia valoro. Dume *Triodos Bank* anoncas pozitivajn ekonomiajn rezultojn. Ĝiaj profitoj estis 27,2 milionoj da eŭroj en 2020, 50,8 milionoj da eŭroj en 2021, 49,9 milionoj da eŭroj en 2022, kaj rekordaj 35,5 milionoj da eŭroj en la unua semestro de 2023. La 41 532 homoj kaj 1727 juraj personoj trafataj loĝas en Nederlando, Belgio, Germanio, Britio kaj Hispanio. La totala valoro de niaj perdoj sumas al pli ol 1,2 miliardoj da eŭroj. Nur en Barcelono centoj da juraj procesoj atendas solvon, kiu kredeble daŭros ankorau plurajn jarojn. Dume, en Nederlando aparta jurproceso celas enprizonigi la respondeculojn de la fraŭdo en *Triodos*.

Multaj el la viktimoj ne nur perdis siajn vivŝparaĵojn, sed ankaŭ bezonas psikologian helpon. La maniero, en kiu *Triodos* (supozeble) fraŭdis per CDA-oj, tre similas al tiuj, kiujn realigis/as normalaj bankoj. Ĉi-foje la viktimoj estas plejparte homoj alt-nivele klerigitaj, kiuj ne fidis la tradician banksistemon, kaj kiuj tamen estis same trompitaj. Ĉu tio signifas, ke etika bankado ne eblas? ■

1. Noto de la redaktoro:

La nomo varias laŭ la lingvo: en la angla: DR (*depository receipts for shares*), en la nederlanda, la „hejmalingvo” de *Triodos*: *certificaten van aandelen*. Esperanta traduko povus esti „atesto de mondepono por aĉeti akciojn”.



Xavi ALCALDE
estas profesoro
pri Komerca Etiko.

BRICS

Ambasadaj eraroj, kiuj rompas efikon

Maksat KUDAJBERGEN

Unu el la planoj de la grupiĝo BRICS (vidu la vidpunkton de Julius Hauser sur p. 3) estas la kreado de komuna valuto. IRNA, la oficiala irana novajagentejo, informis la 5an de septembro 2023 pri rusa projekto de la estonta BRICS-monbileto. Tiun prezentis la rusa ambasadoro en Sud-Afriko dum la festa evento en la ambasadejo de UAE por festi la baldaŭan aliĝon al BRICS. Ĉio estus bona, sed ...

Rusa ambasado stumblas ...

La nomo Respubliko Sud-Afriko estas skribita nur en la afrikansa, kiu estas nek la plej disvastigita nek la plej multnombra el la dek du oficialaj lingvoj de la lando. La plej parolata gepatra lingvo estas la zulua (ĉirkaŭ 23 % de la loĝantaro), la plej ofte uzata en la registaro kaj ŝtataj institucioj estas la angla.

Sur la monbileto, la simbolo de Sud-Afriko estas la monumento memoriganta

Piet Retief, la gvidanton de *Grote Trek* (granda migrado), kiun mortigis la zulua reĝo en 1838. Piet Retief estas heroo nur por la bura popolo de la lando.¹

La simbolo de Barato estas Taĝmahalo, kiun lastatempe la barata registaro ne plu favoras kiel emblemon de la lando.

La nomo Popola Respubliko Ĉinio estas skribita per antaŭreformaj signoj, kiuj estas nun uzataj en la tiel nomata Respubliko Ĉinio sur Tajvano.

Inter la landoj, kiuj laŭ la rusa ambasado deziras aliĝi al BRICS estas Meksiko,

1. Buroj (el la nederlanda „boer”, agrikulturisto) estas la blankaj loĝantoj de Sud-Afriko de nederlanda, germana aŭ hugenota (franca-belga) origino. Ili parolas la afrikansan, lingvon derivitan de la nederlanda el la 17a kaj 18a jarcentoj kun vortoj prunteprenitaj el la angla, malaja, germana kaj malpli ankaŭ el lokaj lingvoj.



kiu ĝis nun neniam esprimis tian intencon.

Por Afganio oni uzas la nomon de la nuna ŝtato, kiu ne estas internacie agnoskata – Islama Emirlando Afganio. Kontraŭe, la ĉirkaŭmetita flago estas de Islama Respubliko Afganio.

... ne unuafaje

La ambasado de Rusio ne sukcesas en siaj aliaj publikrilataj agadoj. Lastatempe ĝi publikigis mapon kun

ĉiuj BRICS kaj BRICS-invitotaj landoj. Akra okulo povis vidi, ke Krimeo kaj la kvar orientaj regionoj de Ukrainio ne estas montrataj kiel parto de Rusio. Antaŭe la ambasado informis pri „faŝistaj marŝoj” en Ukrainio, sed apudmetita foto estis farita dum opozicia marŝo en Moskvo en 2014, post la kontraŭleĝa okupado de Krimeo. Ambaŭ fotoj rapide malaperis el la ambasada retejo. ■

DIABETO

Manĝi bone kaj sin trejni sekure



ŜIBATA Satomi
Japanio



CHINNAPONG / SHUTTERSTOCK.COM



Averto: La ĉi-sube prezentata kuracmetodo postulas fakan akompanadon de medicinistoj. Ordinaraĵoj ne provu ĝin sen konsulti sian kuraciston.

Dieto estas baza kuracado, al kiu diabetuloj submetiĝas jam de longe. Sanservoj tre ofte substrekas la gravon de dieto kaj korpoekzercado, kiuj aparte necesas por diabetuloj. La verkanto laboras en kuracejo pri interna medicino en Hokkajdo, Japanio. Antaŭ la pandemio, ankaŭ en ŝia kuracejo oni ĉiu-

semajne instruis terapion al diabetuloj.

Medicinistoj, kiuj funde studas diabeton, bone komprenas la neceson pri detala informado al pacientoj kaj ne ŝparas tempon por igi diabetulojn konsciaj pri ĉio, kio rilatas al ilia malsano. Por iuj pacientoj ne facilas daŭrigi la rekomendatan terapion, kvankam aliaj efektive, zorge kaj „malpigre” plenumas la ĉiutagajn

preskribitajn taskojn. En la kuracejo de Hokkajdo la unua menciita grupo kutime ridetas kaj ŝajnigas, ke ĉio iras bone. Sed ilia malsano senkompatate progresas, se ili ne povas plenumi la ĉiutagajn taskojn.

Longdaŭra kaj tuj-efika insulino

Kiam oni manĝas karbonhidratojn, la tiel nomataj beta-ĉeloj en la pankreato sekrecias senprokraste insulinon. Ĉe homoj sanaj, t.e. sen diabeto, la kvanto de insulino eligata en ilia organismo rekte dependas de la kvanto de alprenitaj kar-

bonhidratoj. Ĉar diabeton kaŭzas la manko de sekrecio de insulino (kiu malaltigas la nivelon de sukero en la sango), ĉe diabetuloj la nivelo de sangosukero danĝere altiĝas post abunda enpreno de karbonhidratoj. Multaj homoj trafita de diabeto injektas al si do insulinon por kompensi la mankon de la kutime nature sekreciata insulino. Iuj injektas du specojn de insulino plurfoje tage, nome longdaŭran insulinon kaj tuj-efikan insulinon injektendan antaŭ manĝado. Ili devas kutime memkontroli la kvanton de sangosukero 3-4 fojojn tage.

Grafikaĵoj pri donitaĵoj

Antaŭ pli ol jardeko aperis nova metodo rilata al iu dieto nomata „karbonkalkulado”. Per tiu lasta oni kalkulas la kvanton de karbonhidratoj en la diversaj manĝaĵoj. Al diabetuloj, kiuj injektas al si tuj-efikan insulinon, oni konsilas injekti la ĝustan kvanton de insulino surbaze de la efektive alprenotaj karbonhidratoj, konsiderante kelkajn individuajn diferencojn. Tamen oni ne povas konfirmi, ke la konsiloj pri la preciza kvanto de necesa insulino estas ĝustaj, ĉar memkontroli sangosukeron nur po 3-4 fojojn tage ja ne sufiĉas por konstati la efektivan nivelon de sangosukero post manĝo. Sed de kelkaj jaroj eblas vidi precizajn datumojn ĉe liniaj grafikaĵoj pri sangosukera nivelo danke al nova memkontrola mezurilo, kiu havigas detalan analizon de ĉiuj donitaĵoj por pli granda sekureco. Nun oni instruas al diabetuloj mastrumadon de la tiurilata sistemo: la surmeto de la nova memkontrola mezurilo ebligas registri kaj havi aliron al la nivelo de sangosukero dum la lastaj 14 tagoj.

Muskola/aerobika trejnado

Medicinistoj kaj diabetuloj kunhavigas la datumojn de liniaj grafikaĵoj pri sangosukera nivelo. La kuracistoj konsilas al unuopaj diabetuloj, kiom da in-

sulino injekti, konsiderante la alprenitan kvanton de karbonhidratoj, oleo kaj graso, kiuj influas tiun nivelon. Estas bone injekti pli da insulino, se oni manĝas pli da karbonhidratoj. Diabetulo rajtas manĝi same kiel ne-diabetuloj, nur se la metodo ĉi-supre menciita estas realisma kaj praktikebla ĉe li sub la kontrolo de kuracisto.

Tiamaniere diabetuloj fariĝas pli liberaj. Plie oni devas konsideri ankaŭ la efikojn de fizika ekzercado. Muskolaj trejnadaj akute malaltigas la nivelon de sangosukero, kaj tiu efiko ofte daŭras ĝis la venonta mateno. Male, aerobika ekzercado nur milde malpligrigas sukeron en la sango. Ĉe aerobika ekzercado, muskoloj uzas kaj glukozon en la sango kaj liberan grasan acidon liberigitan de korpaj grasaj ĉeloj. Male, ĉe muskola trejnado muskoloj uzas kaj glikogenon mem kaj glukozon en la sango. Dum muskola trejnado, elĉerpiĝas glikogeno en muskoloj. Kiam glikogeno mankas en muskoloj kaj la nivelo de insulino en la sango estas alta, la glukozo en la sango (kiel glikogeno) eniras kaj plenigas la muskolojn. Ĉe ne-diabetuloj la kvanto de insulino en la sango, kiu estas sekreciata de beta-ĉeloj, dependas de la nivelo de sangosukero. Kiam la sangosukero malaltigas post muskola trejnado, beta-ĉeloj malmultigas la sekrecion de insulino. Sed ĉe diabetuloj, kiuj injektas

al si insulinon, la kvanto de insulino en sango ja dependas de la injektita insulino.

La hormono glukagono

Glukagono estas unu el pluraj hormonoj, kiuj altigas sangosukeron. La rilato inter insulino kaj glukagono estas grava por sintezi glukozon en la hepato. Kiam insulino estas malalta kompare al glukagono, la hepato produktas kaj eligas glukozon. Kiam diabetuloj faras muskolan trejnadon, kiam ili injektas al si insulinon kaj manĝas karbonhidratojn kiel kutime, ilia sangosukero fojfoje malaltiĝas. Se la kvanto de insulino kompare al tiu de glukagono estas alta, la hepato ne produktas kaj ne eligas glukozon; male glukozo en la sango eniras kaj konserviĝas, ene de la hepato kaj la muskoloj, kiel glikogeno. Tiusence oni devas delikate trakti fortan muskolan laboron ĉe diabetuloj.

Pli da zorgo necesas post ... neĝado

Indas klarigi ion pri neĝoŝovelado en neĝplenaj regionoj kiel tiu de la verkanto: Hokkajdo. Oni anticipe konsilas al diabetuloj eviti troan malaltigon de sangosukero kaj do aparte mencias neĝoŝoveladon: ili fojfoje fakte forgesas, ke neĝoŝovelado estas muskola laboro. En Hokkajdo 30 ĝis 50 centimetroj da neĝo falas tage 2 aŭ 3 fojojn jare. La matenon post multneĝa

tago, multaj diabetuloj kun malalta sangosukero, kiuj ŝovelis neĝon en la antaŭa tago, vizitas kuracejon. Antaŭ neĝoŝovelado la diabetuloj, kiuj injektas al si insulinon, devas injekti malpli da insulino aŭ manĝi pliajn karbonhidratojn; kaj ĉe la sekva manĝo ili devas enigi pli da karbonhidratoj ol kutime. Krome ili devas alpreni iom da karbonhidratoj kaj laktaĵoj antaŭ enlitiĝo, ĉar karbonhidratoj altigas la nivelon de sangosukero du horojn post manĝo, kaj laktaĵoj milde altigas ĝin de noktomezo ĝis frumateno. Se temas pri la homoj, kiuj surmetas la novan mezurilon, kiu ebligas facile kontroli la nivelon de sangosukero, dum neĝoŝovelado ili povas observi simplamaniere kaj realtempe la nivelon de sangosukero kaj tuj enkonduki glukozon por eviti akutan malaltigon de sangosukero. Plie, kontroli kaj observi la datumojn ĉe liniaj grafikaĵoj pri la sangosukera nivelo instigas ilin konsciigi pli kaj pli pri sekura agado. Tiamaniere sinekzercado de diabetuloj fariĝas pli sekura. ■



ŜIBATA Satomi
estas medicinistino
loĝanta en Hokkajdo,
Japanio.

ITALIO/KIPRO

Pristudi la planedon Merkuro sur kipraj montoj

**Roberto Pigro**

redaktoro de la rubriko „Scienco” el Italio, loĝanta en Kipro



NERTHUZ / SHUTTERSTOCK.COM

Ĉu eta insulo en Mediteraneo kiel privilegia laboratorio por pristudi la planedon Merkuro? Jen la rezulto de lastatempa, unuavide nekredebla malkovro, kiu malkaŝas, ke promeni sur iuj rokoj sur altaj montoj de la insulo Kipro signifas promeni sur iama oceana fundo. Temas pri rokoj kun unikaj trajtoj sur Tero, treege similaj al tiuj ĉeestaj nuntempe sur la surfaco de Merkuro, la planedo plej proksima al Suno.

La insulo Kipro, kiel probable nekonate, estis origine ero de oceana krusto, kiu estis puŝata al la surfaco antaŭ pluraj milionoj da jaroj. Nicola Mari [nikola mari], juna itala esploristo pri planeda geologio kaj vulkanologio ĉe la Universitato de Pavio, kune kun aro da kolegoj de NASA/Johnson Space Center kaj de la Muzeo pri planedaj sciencoj en Prato (centra Italio), analizis kelkajn specimenojn de lafoj prenitaj el Kipro. La rezulto? La lafoj, kiujn oni kolektis sur la malgranda insulo, kie laŭ mito eĉ naskiĝis

la diino Afrodito, ege similas al iuj rokoj sur Merkuro, tiuj kun plej multa magnezia enhavo. Ĉi tiuj ŝtonoj havigis al la fakuloj altvaloran trezoron por kompreni la manieron, kiel Merkuro evoluis. La datumoj devos esti integritaj kaj komparitaj kun tiuj, kiuj kolektiĝos kadre de la misio *BepiColombo*, kiu alvenos al tiu planedo de la sunsistemo en la venontaj jaroj.

Lafo

Temas pri unu el la plej ambiciaj interplanedaj esplormisioj iam ajn planitaj kaj entreprenitaj de Eŭropa Kosma Agentejo (ESA). La

esplorado de Merkuro estas grava por difini kaj validigi la modelojn pri formiĝo kaj evoluo de la tuta sunsistemo kaj por kompreni la lim-kondiĉojn, kiuj favoras la estiĝon de vivo sur nia kaj aliaj planedoj. Ĝenerale, danke al la malkovro de similaj ŝtonoj sur Tero, tiama maniere eblas pli bone kompreni, kiuj procezoj okazas sur Merkuro aŭ aliaj planedoj. En nia mondo ekzistas efektive pluraj medioj, kiuj estas iel similaj al eksterterraj medioj. Tiu simileco povas esti de du ĉefaj specoj: morfologia simileco, kiam aparta medio reflektas la aliplanedan el la pejzaĝa



Kelkaj specifaj lokoj sur la montaro Tróodos en Kipro estas konsiderataj bonaj geohemiaj analogoj de Merkuro kaj klarigas kiel boninitoj povus esti gravaj komparnormaj specimenoj por la hemiaj kaj spektraj datumoj atenditaj de la misio BepiColombo.

vidpunkto; aŭ geokemia simileco, kiam la rokoj en aparta ter-loko estas kemie similaj al tiuj de alia planedo. La esplorcelo de la internacia teamo en la lastaj jaroj koncentriĝis je la serĉado de eblaj geokemiaj analogioj inter Tero kaj aliaj planedoj. Precipe, la esplorado okupiĝis pri la lafoj de la planedo Merkuro, kien la misio *BepiColombo* alvenos en 2025. Neniam antaŭe okazis studo celanta priesplori eblan kemian analogion inter la tera kaj la merkura surfacoj. Antaŭ nelonge oni finfine trovis fragmenton de lafo en Kipro, kiu notinde kaj sensacie estas pleje si-

mila al la lafoj ekzistantaj sur tiu malgranda planedo proksima al Suno.

Promeno sur Merkuro

Dum unu jaro, antaŭ ol komenci la koncernen esploron en Kipro, Mari analizis kelkajn meteoritojn (nomatajn „aŭbritoj”) konsideratajn similaj al Merkuro. „El ilia kemia konsisto ni ekhavis ideon, kion serĉi sur nia planedo kaj kie serĉi ĝin. Ni komprenis, ke kelkaj specifaj lokoj sur montoj de la insulo Kipro povus enhavi lafrokojn, precize kiajn ni serĉas. Ilia nomo estas boninitoj, kaj ili estas specialaj lafaj rokoj, kiuj estiĝas en



Kelkaj specifaj lokoj sur montoj de la insulo Kipro povus enhavi lafrokojn, precize kiajn ni serĉas. Ilia nomo estas boninitoj

oceanaj profundoj. Se diri simple, Kipro estas fragmento de antikva oceana krusto, kiun, dum milionoj da jaroj, la krustaj fortoj de Tero puŝis al la surfaco. Kipro, kiel ni pli-malpli scias hodiaŭ, formiĝis en Tetiso (antikva oceano, kiu ne plu ekzistas) antaŭ ĉirkaŭ 90 milionoj da jaroj,” diris Mari. Do oni ja planu vojaĝon al Kipro: piediri tie, specife sur la montaro Tróodos, ja egalas al promenado sur praaj marfundoj – kaj iamaniere eĉ al sorĉa (kaj malmultekosta) ekskurso sen kosmoŝipo sur malproksima sunsistemo. ■



ANNA KRIVITSKAYA / SHUTTERSTOCK.COM

RUSIO

Ĉu la plej malbona lando por vivi?



Andrey **BOCHKAREV**
Turkio

La amasa elfluo de la loĝantaro el Rusio, observata en la lastaj jaroj, kaj precipe post la komenco de la milito kontraŭ Ukrainio, montris, ke, malgraŭ la sukceso de propagando, la reala bildo tie estas sufiĉe morna. Por multaj pens-emaj rusiaj civitanoj, tio neniam estis sekreto. Pluraj tamen rezignis pri elmigrado, aliaj simple ne havas kuraĝon fari tion, aliaj estas retenataj de familiaj ligoj, ŝat-

ata laboro ktp. Tamen, objektiva vidpunkto, subtenata de nombroj, montras, ke Rusio estas unu el la plej malbonaj landoj por vivi.

Vivnivelo kaj sekureco

Por pruvi tion necesas konsideri plurajn faktorojn, aŭ pli ĝuste, konsideri ilin kune kaj kompari kun aliaj landoj. La unua faktoro estas la vivnivelo. Laŭ pluraj fontoj Rusio okupas ĉi tie la 52an lokon en la mondo.



Laŭ la nivelo de perfortaj krimoj, Rusio okupas unu el la unuaj lokoj en la mondo

Kiel duan faktoron mi inkluzivigis sekurecon, ĉar ofte la civitanoj de ĉi tiu lando deklaras, ke ili pretas oferi sian vivnivelon favore al sekureco. Laŭ la nivelo de perfortaj krimoj, Rusio okupas unu el la unuaj lokoj en la mondo. Perfortaj krimoj inkluzivas murdon, seksperforton kaj huliganismon. Ekzemple, la nombro da murdoj en Rusio estas 12,5 por 100 000 homoj jare. En Usono, ĉi tiu nombro estas 5,5 (dum en Usono la nom-

bro da pafiloj estas pli ol 1,2 ekzempleroj por persono, inkluzive de beboj, en Rusio ĉi tiu nombro estas almenaŭ 10-oble malpli alta, sed krimoj kun uzo de pafiloj, kvankam ne nur murdoj, estas farataj duoble pli ofte ol en Usono). Interese, ke samtempe Rusio estas ankaŭ la unua en la mondo laŭ la nombro de policanoj laŭkape. El kiu unu el du konkludoj povas esti tiritaj: aŭ la polico estas neaktiva, aŭ ĝi estas implikita en perfortkrimo.

Trafikakcidentoj

Alia indikilo de vivsekureco povas esti mortemo en trafikaj akcidentoj. Rusio estas unu el la kvin landoj en Eŭrazio kun la plej alta mortokvanto en trafikaj akcidentoj. Ĉiujare tie 18 el 100 000 homoj mortas sur la vojoj, proksimume 3 mortoj por 1000 veturiloj. Por komparo, en Usono, ĉi tiuj nombroj estas 11 kaj 0,1, respektive, en Turkio, 12 kaj 2,5. De la dua nombro de la ĉi-supraj statistikoj, ni povas konkludi, ke aŭtoj uzataj en Rusio estas nesekuraj.

Ankaŭ la mortoprocenĵo pro malsanoj en Rusio estas unu el la plej altaj en la mondo. Ĝi estas la unua en mortemo pro apopleksio, kancero kaj infektaj malsanoj, kio indikas malaltan nivelon de medicina prizorgo.

Kutime, kiam oni determinas la vivnivelon,



Rusio estas la unua lando en mortemo pro apopleksio, kancero kaj infektaj malsanoj, kio indikas malaltan nivelon de medicina prizorgo



Post la altrudo de sankcioj pro la invado en Ukrainion, konkurenco en Rusio malfortiĝis, la kvalito de manĝaĵoj fariĝis eĉ pli malalta



Laŭ libereco, ĝi rangas pli alte ol Egiptio, sed la kvalito de manĝaĵoj en Egiptio estas pli alta kaj la klimato estas pli favora

parametro kiel la kvalito de nutrado ne estas konsiderata. Vere, ĝi nerekte rilatas al la atendata aĝo de morto, kiu estas konsiderata, kiam oni kalkulas la vivnivelon. Loĝantoj de Rusio tradicie kredas, ke ilia kuirarto estas la plej bona. Pri gustoj ne estu disputo: iu ŝatas rusan kuirarton, iu ŝatas ĉinan. Tamen, vojaĝante eksterlanden, precipe al sud-eŭropaj landoj, ili rimarkas la altan kvaliton de lokaj produktoj. Precipe viando, lakto, faruno. Ekde la tempo de Sovetunio, kie estis ĝenerala manko, rusoj al kutimiĝis al surogatoj kaj malmultekostaj anstataŭaĵoj. Fabrikistoj ankaŭ adaptiĝas al ilia gusto. Malmultaj obeis la ŝtatajn normojn en Sovetunio, kaj poste ili estis tute nuligitaj. Post la altrudo de sankcioj pro la invado en Ukrainion, konkurenco en Rusio malfortiĝis, la kvalito de manĝaĵoj fariĝis eĉ pli malalta.

Nivelo de libereco

Laŭ *Freedom House*¹, la libereca stato de Rusio okupas la 172an lokon, inter Ruando (171) kaj Kongo (173). Alivorte civitanoj de la Rusia Federacio estas malpli liberaj ol loĝantoj de Maŭritanio aŭ Kuvajto.

Ekologio

Por ĉi tiu parametro Rusio estas proksimume en la mezo, en la 112a loko, ced-

ante ne nur al evoluintaj landoj, sed ankaŭ al Afganio, Cent-Afrika Respubliko ktp. Ĉi tio rekte influas la nombron de malsanoj, kaj tial la vivdaŭron.

Klimato

Kutime ĉi tiu faktoro ne estas konsiderata, kiam oni taksas la nivelon kaj la kvaliton de la vivo. Tamen ĝi rekte influas la kostojn asociitajn kun disponigado de komforta aŭ eĉ necesa temperaturo en hejmo. La averaĝa jara temperaturo en Rusio estas -5,1 celsiaj gradoj. Kompreneble, ĉi tiun parametron forte influas la enkalkulado en la statistiko de Siberio kaj la Malproksima Nordo, kie loĝas ne-grava parto de la loĝantaro de ĉi tiu lando. Tial, estas pli bone konsideri la averaĝan temperaturon en la mez-eŭropa parto de Rusio. Ĝi estas +6,3 gradoj. Ĉi tio estas pli bona ol en Kanado (-5,35, Kebekio +5,4), Kartvelio (+5,8), Svedio (+2,1), Svislando (+5,5), sed ĝi estas tute nesufiĉa por supervivado sen specialaj rimedoj por protekti kontraŭ la malvarmo: hejma izolado, varmaj vestaĵoj.

Vivsurfaco

La temo klimato povas esti ligita ankaŭ al loĝado. Malgraŭ la grandega areo kaj senlima kvanto de naturaj konstrumaterialoj aŭ krudmaterialoj por produkti loĝejojn, la norda najbaro de Ĉinio havas gran-

1. <https://freedomhouse.org/>

dajn problemojn por solvi la loĝejan problemon. Do, unu persono tie disponas nur ĉirkaŭ 28 kvadratajn metrojn. Tiu ĉi nombro estas tamen pli alta ol ekzemple en Pollando, sed ĝi konsideras kadukajn kaj preskaŭ detruitajn loĝejojn, kaj ankaŭ vilaĝajn barakojn, en kiuj la poloj ne loĝus. Eĉ en Japanio, malriĉa je naturaj rimedoj kaj suferanta pro troloĝateco en urboj, statistiko montras 39 kvadratajn metrojn da loĝloko por loĝanto. La situacio estas pli malbona ol en Rusio nur en Honkongo (15 kvadrataj metroj) kaj Ĉinio (20 kvadrataj metroj).

Konkludo

Ni povas konkludi, eĉ konsiderante personajn subjektivajn preferojn (kuirarto, klimato), ke Rusio estas unu el la plej malbonaj landoj por vivo kaj disvolviĝo de krea potencialo. La klimato tie estas pli bona ol en Kanado aŭ Svislando, sed la vivnivelo estas multe

pli malalta. Laŭ libereco, ĝi rangas pli alte ol Egiptio, sed la kvalito de manĝaĵoj en Egiptio estas pli alta kaj la klimato estas pli favora. Tie oni malpli verŝajne povas esti mortigita de krimulo, trafiki en mortigan akcidenton, morti pro apopleksio aŭ veneniĝi per surrogata alkoholo.

La vivnivelo en Rusio estas pli favora ol en Belorusio, Bulgario, Meksiko kaj Tajlando, sed la rusianoj havas pli altan probablecon morti en akcidento, de la manoj de krimuloj aŭ la polico, de kronika malsano ol la belorusianoj. El la vidpunkto de klimato, ĝi estas malpli komforta ol ĉi tiuj landoj kaj postulas altajn kostojn por havigi varmon, sen menci la kvaliton de manĝaĵoj.

Rusio havas pli malaltan nivelon de perforta krimo ol Brazilo aŭ Meksiko, sed la totala mortoprocento (laŭ kombinaĵo de kaŭzoj perfortaj, naturaj, malsanoj, trafikaj akcidentoj, akciden-

toj, naturaj katastrofoj) en Rusio estas multe pli malbona ol en tiuj ĉi landoj. Nome en Rusia Federacio por 1000 homoj jare estas po 13,4 mortoj, en Brazilo 5,9, en Meksiko 4,8. Kompare kun ĉi tiuj landoj, la nivelo de liberecoj, la kvalito de manĝaĵoj kaj la klimato en Rusio estas multe pli malbonaj. Estas interese, ke en batalanta Afganio ĉi tiu nombro estis 11,5, kaj kvankam la nivelo de libereco tie estas eĉ pli malalta ol en Rusio, la klimato estas pli bona kaj la kvalito de manĝaĵoj estas pli alta. ■



MONATO volas kontribui al la socia debato pri aktualaj temoj. Ĉar laŭ nia opinio gravas aŭdi plurajn voĉojn, ni regule aperigas opinio-tekstojn. Ĉiu aŭtoro verkas propranome kaj sola respondecas pri la enhavo de sia teksto.



Andrey BOCHKAREV estas internacia ĵurnalistoj, kiu naskiĝis en Siberio en 1964. Li studis la kristanan filozofion en Pollando kaj dum la lastaj 20 jaroj loĝas en Turkio.



“Naturista Vivo”, la ilustrita revuo por nudistoj/ naturistoj/ nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero.

La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj.
Internacia Naturista Organizo Esperantista.
Adreso: József Németh, HU-8531 Ihász, Fő u. 41/5.
Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

Spioni kaj esti spionata

Carlo MINNAJA

Reveno post jardekoj al la loko de sia knabaĝo; la iama vilaĝo estas la sama aŭ preskaŭ; sama estas la Sakstrateto; la iamajn loĝantojn oni devas rekonstrui: familio Hayward estas la kerno. Kio pensigas pri la iamaj aventuroj, la iama timo, la iamaj suspektoj? La tempo estas la komenco de la dua mondmilito, la loko estas neprecizigita, sed evidente lando kontraŭnazia, kaj timata monpuno estas en ŝilingoj.

La rakonto komenciĝas, kiam estas detale priskribitaj la protagonistoj kaj ties familioj. Abundas detalaj priskriboj de la enĉambra arango (tetrinkaj pletoj, sur kiuj kuŝas bongustaj keksoj) por enigi la leganton en

la etoson de iu antaŭe sekreta, sed tuj eksploda sciigo.

La rakontanto klopodas rekonstrui la epizodojn kaj la etoson de sia knabaĝo. Lia tiama nomo estas Stephen, kun fidela (ĉu ĉiam?) kunludanto Keith, sed ie-tie li mismemoras: „Ĉu la policano venis jam pli frue? Estas tre malfacile memori, en kiu ordo la aferoj okazis. Tamen, se ne eblas memori *tion*, tiam ne eblas elcerbumi, kio kondukis al kio, kaj kia estis la interligo. Kio revenas al mi, kiam mi atente ekzamenas mian memoron, tio eĉ ne estas rakonto. Ĝi estas kolekto da vivaj detaloj. Certaj vortoj parolataj, certaj objektoj ekvidataj. Certaj gestoj kaj mienoj. Certaj humoroj, certaj veteroj, certaj horoj de la tago kaj statoj de la lumo.”

La ĉeffrazo, kiu startigas la sinsekvon de la memor-

ataj epizodoj estas „Mia patrino estas germana spiono”: frazo dirita sekrete, eble eĉ bedaŭre, sed ne tiom.

Rigardado de fotoj, kalendaro kun surskriboj, eble cifroj, stimulas dubojn kaj suspektojn. Spioni spionon, kiu tre verŝajne direktiĝas al sekreta rendezvuo kun aliaj spionoj, estas tre delikata entrepreno: lin (ĉi-okaze ŝin) gvati kaj kaŝe sekvi, kiam ŝi oftege iras al la poŝtoŝejo kaj sendas, sendas, sendas poŝtaĵojn (al kiu?). Barilo dividas mondojn, ĝin transsalti kondukas al mistero, en-kaj el-veno tra tunelo postkure al la spionino, tamen neniam kaptata ĉe l' freŝa faro, entuziasme vigligas momente sed seniluziigas ĉe la posta sekundo. Sonoj aŭdiĝas, donas esperon pri solvo de la mistero sed


tuj forfadas: la *vera kio* malpreciziĝas, maltroviĝas, malaperas.

Timiga aventuro

Ĉiu el la knabaj maloftaj ekskursoj en la tunelon estis timiga aventuro, sinsekvo da kuraĝoprovaj por onia baldaŭa viriĝo. Kaj la unua el la kuraĝoprovaj estis la tunelo mem. Spure al la virino suspektata pri spionado la du knaboj enkotigis en aventuron, kiun ili ne supozis devi entrepreni.

„Denove mi sentas la humidan tuŝon de la muroj sur miaj haroj kaj ŝultro, kaj brosas per la manoj la putrajn eksudaĵojn, kiujn ili postlasis. Denove mi klopodas forviŝi la malhelverdan ŝlimon de miaj manoj.”

Alia loĝantino de la Sakstrateto, Barbara Berrill, aperas abrupte; ĉu ankaŭ ŝi spionas la spionantajn knabojn? Misteras Onjo Dee, vizitata oftege, ĉu nur ĉar simpatia proksima parenco? Aŭ ĉu ŝi ion scias, ion transdonas, ion transprenas? Ĉu kaŝita ŝakrado de cigaredoj (por nefumantoj)? Sekretoj konfidataj,



Michael Frayn: *Spionoj*. El la angla tradukis Edmund Grimley Evans. Eld. Esperanto-Asocio de Britio, Barlastono, 2023. 241 paĝoj. ISBN 978-0-902756-64-9.

nesuspektataj edzinoj havas koramikon; prefere oni ne sciu, kiu scias tion. Honorpromesoj silenti, muti – pri io, kion oni vidis kaj oni estus devinta ne vidi. Kaj ĉio povas esti registrata en loglibro ...

La tunelo enigas en transmondon, kie la du knaboj celas havi sian gvatejon; sed la spionado iĝas spionanto. Kesto aperas, malaperas, jen kun io interne, jen (surprize) kun nenio, tamen estas io deponita, iu skribaĵo; kiel oni deĉifru frazostumpojn? Kio enestas, se ies mano elvenas humida? La luno aperas kaj vual-iĝas, sonoj venas kaj fadas: „Mi aŭdas miajn dentojn klakadi kiel ĵetkuboj en skuilo.” „Silente mi elpaŝas en la arĝentan mallumon, kaj iĝas parto de ĝi.”

Ne ordinara krimromano

La etoso de la tuta rakonto estas streĉa, timiga, morna; aldoniĝas la nigrumo por kaŝiĝo kontraŭ malamikaj avioj. Ĝi ne estas ordinara krimromano, ĉar mortinto ne evidentiĝas (sed eble subkomprenatas), sed apero de misteroj estas ĉiuĉapitra, ekzemple longa lana ŝtrumpeto, malhelblua, kun multe flikita kalkanumo aŭ monujo el bosita ledo. Aperas novaj rolantoj, jen ne pli bone difinita „vojulo” (ĉu seksa deviulo?), jen surbicikla policisto. Kial ili venis? Kion ili komunikis? Al kiu? La du knaboj senpaŭze esploras la straton: „Ni plu iras malrapide, alrigardate kaj albojate, ĝis ni malaperas trans la kurbigon.”

Ŝipo ŝanĝas sian kurson, kaj solvo, ĉu parta, ĉu tuta, ĉu akceptebla, kompreneble atingas la ĝisfinan leginton, kiu certe malfacile forgesos tian verkon, kiu eble povos kontribui al ne tute tradormitaj noktoj ... Senti sin spionata ensonĝe ja ne estas trankviliga impresio.

La traduko estas ege flua, kun kelkfoja, eĉ se malofta, bezono de vortaro, ĉar envenas nekutimaj vegetaĵoj, kiuj per sia aspekto,odoro (aŭ fetoro) estas gravaj elementoj de la etoso. ■

Ne legu tiun libron en trajno, metroo aŭ buso!

Fernando PITA

Se iam iu, kuraĝa aŭ freneza – ĉar ambaŭ kvalitoj estas similaj – sin proponos esplori kaj listigi, kiuj estas la literaturaj ĝenroj preferataj de esperantistoj, ne estos ja surprizo, ke krimromanoj okupas en ĝi elstaran lokon. Sufiĉas fulma konsulto de la katalogoj de niaj plej buntaj kaj variaj libroservoj (komencu ĉe FEL!) por konfirmi, kion mi ĵus diris: ne nur estas multaj titoloj tradukitaj el diversaj lingvoj, sed ankaŭ libroj de esperantistaj aŭtoroj mem, kiel *Pro kio?*, de Friedrich Ellersiek, per kiu la ĝenro debutis en nia lingvo, ĝis la Ĉu-libroj de Johán Valano (plumnomo de Claude Piron), kiuj, kvankam kun precipe didaktikaj celoj, estis samtempe enkadrigeblaj en tiu ĝenro. Kaj oni eĉ ne menci

la looongan

liston de krimromanoj verkitaj de Julian Modest!

Tial estas neniel surprize, ke finfine aperas en Esperanto traduko de *La murdo de Roger Ackroyd* de la mondfama angla verkistino Agatha Christie: verko, en kiu oni vidas debuton de la plej fama konkuranto de Sherlock Holmes, la belga (ne franca!) detektivo Hercule Poirot. Kaj kiam mi diras „konkuranto”, mi parolas serioze: krom la granda furo-ro de iliaj libroj, tiuj du roluloj ofte estas reprezentitaj en kino, televido ktp, kaj tio kunportas ilian lukton por la prefero de la multlingvaj legantoj for de beletraj batalempoj. Mi persone diras, ke, kvankam pro la forto de la hollywooda kinindustrio Holmes aperis pli ofte sur arĝentaj ekranoj, Poirot estas reprezentita de aktoroj pli kongruaj al la rolulo mem, kiel Albert Finney kaj Peter



Agatha Christie: *La murdo de Roger Ackroyd*.

El la angla tradukis Hans Becklin. Eld. Esperanto-Asocio de Britio, 2023. 296 paĝoj. ISBN 978-0-902756-68-7.

Ustinov ... Sed oni revenu al la verko, ĉar eldono de tiu libro ebligas, ke la esperantolingva legantaro finfine sin plezurigu, legante kaj komparante la metodojn de tiuj famaj detektivoj.

Teksto vere flua kaj glata

Tamen ne nur tiuj faktoj estas ĝuigaj: scii, ke la tradukinto Hans Eric Becklin sufiĉe kapablis, dum la pandemaj jaroj, apartigi sin de la teruraj tiamaj novaĵoj kaj sukcese laboris pri tiu traduko, estas plia ekzemplo pri la diversaj manieroj, kiel nia lingva komunumo povis elturniĝi antaŭ realaĵo, kiu estis unuavide neniel flanklasebla.

Kaj – kio estas ja plej grava – estas feliĉige konstatiti, ke la rezulto de lia traduko estas teksto vere flua kaj glata: eĉ la franclingvaj esprimoj uzataj de Poirot, prezentitaj en piednotoj, neniel fariĝas problemoj por pli junula legantaro, vivanta en tempo, kiam la franca ne plu estas „internacia lingvo de ĉiuj saĝuloj”. Alia afero estas, ke la leganto ne stumblas antaŭ gramatikaj misoj aŭ malĝusta vortelekto. Tiu vortelekto, cetere, estas tre kompetente farita: taŭga kaj preciza, ĝi ne cedas antaŭ eblaj premoj uzi „facilajn” vortojn, nek, kontraŭe, plenigas la tekston per erudiciaj esprimoj, kiuj devigas konsulti vortaron. Tiuj esprimoj kaj vortoj ja estas tie, kaj per ili oni eĉ riĉigas sian

vortprovizon, sed la fina rezulto estas legado ja ĝuinda, kiel legado devas ja esti.

Mistera etoso

Alia rimarkinda afero estas la zorgemo de la eldonistoj: kvazaŭ detektive, tiuj homoj de Esperanto-Asocio de Britio, fasonante ĉi tiun libron, vere atentis ĉiujn detalojn: de la enpaĝigo kaj litertiparo, kiuj reliefigas la dividadon inter kaj en la ĉapitroj; ĝis la belege velura kovrilo, kun brunaj (iuj dirus kafaj) kolortonoj; ĉio kontribuas al pliigo de la mistera etoso postulata de la verko. Tiom zorgema eldono ja meritas proporcie havi, en Esperanto, la saman komercan sukceson, kiun verkoj de Agatha Christie havas en aliaj lingvoj.

Sed, antaŭ ol fini tiun ĉi recenzon, kiu, mi agnoskas, ne estas senpartia, mi devas lasi finan averton al la leganto: ne eklegu ĉi tiun libron, se vi estas premata de la tempo, kiel dum kafaŭzo aŭ tagmanĝo, kaj ne legu ĝin dum vojaĝo per trajno aŭ aŭtobuso, ĉar, plene kaptita de la teksto, kaj engaĝita en eltrovo de la murdo de Roger Ackroyd, eble vi maltrafos vian celatan stacidomon aŭ bushaltejon. ■

Brutala liberigo de pasinteco

Alexander MIKISHEV

La nova libro de la konata ĵurnalisto kaj esperantisto Kalle Kniivilä ĵus aperinta ĉe la novjorka eldonejo Mondial malgraŭ sia relative malgranda formato forte impresas kaj „frapas” onin ekde la unua paĝo, verŝajne ĉar temas pri la sorto de homoj, kiuj loĝas tute proksime al multaj el niaj legantoj – en la belega kaj neforgeseble pitoreska orient-eŭropa lando Ukrainio.

Nur naŭ malgrandaj rakontoj. La aŭtoro lerte ne nur prezentas la historiojn de la intervjuitaj homoj, kiujn li renkontis dum sia vojaĝo al Ukrainio, sed paralele priskribas la modernan historion de la lando. Tiu priskribo eble estas farita iom skize, sed sufiĉe detale por komprenigi, kio okazis kaj nun okazas en tiu parto de Orienta Eŭropo. La eventoj ekas per la eksplodo en ĉernobila nuklea

centralo en 1986 kaj daŭras tra la oranĝkola revolucio de 2004 kaj sekvas tra alia revolucio en 2014, la poste triumfa elekto de Volodimir Zelenskij kiel prezidanto, kaj ĝis la terura rusia invado en 2022.

Nur naŭ rakontoj

Tiuj naŭ mallongaj rakontoj strebas klarigi al la legantoj, kian diferencon havas Ukrainio kaj ukrainoj disde sia orienta najbarlando kaj ĝia popolo. Por multaj el vi Ukrainio verŝajne longe troviĝis en la ombro de Rusio. Tamen, kiel agnoskas la aŭtoro, „la politiko en Ukrainio kun siaj abruptaj turniĝoj, kotoĵetado kaj akraj televidaj debatoj estis malfacile komprenebla, ĉar ĝi tute ne similis al la strikta disciplino kaj hierarkio en Rusio”. Bedaŭrinde ankaŭ pluraj loĝantoj de Rusio ne komprenas tion. Ja ilia prezidanto opinias la nuran ek-

ziston de Ukrainio granda historia miskompreno. Li persvasas siajn civitanojn pri tio, ke rusoj kaj ukrainoj estas la sama popolo, ke la moderna Ukrainio estas kreaĵo de Lenino, ke sen sia granda najbaro Ukrainio ja simple ne povas ekzisti.

En ĉio, kio okazas, kulpas Usono kune kun NATO-landoj kaj iliaj disĉiploj venintaj al gvidaj postenoj en Ukrainio. Tiujn blufojn oni ĉiutage senĉese propagandas per rusiaj televido, gazetoj kaj rusa Interreto (kiun oni planas baldaŭ „sendependigi” de la tutmonda reto). La terura rusia invado komencita la 24an de februaro 2022 kaj ĝia totala tutmonda kondamno atentigis multajn eŭropanojn pri tio, kiu pravas en la militkonflikto. Oni ekkomprenis, kian danĝeron havas reĝimo bazita sur la aŭtokratio de unu sola persono, gvidanta per falsaj kaj danĝeraj ideoj, similaj al tiuj ekzistintaj antaŭ 80 jaroj en la centra parto de Eŭropo.

Vekiĝas lando, „vekiĝas” popolo

Kniivilä per mallongaj intervjuoj kun ordinaraj homoj el diversaj regionoj de Ukrainio, diversnivele edukitaj kaj laborantaj en absolute diversaj kampoj, lerte montras al ni, kiel Ukrainio ŝanĝiĝis post la disfalo de Sovetio kaj transformiĝas al mal-Rusio. La aŭtoro substrekas: la libro ne estas pri la milito, kiu ĉiam apudas, sed pri homoj, kiuj ne

propravole perdis ne nur siajn hejmojn kaj laborlokojn, sed siajn familianojn, amikojn, kolegojn. Pluraj el ili draste ŝanĝis sian vivon, sian okupon kaj – tre grave por la estonteco – sian opinion pri la „frata” najbaro. Por multaj el la intervjuitoj tio ne estis facila: ja oni kutimis paroli ruse, precipe en la orienta parto de la lando, spekti rusajn filmojn, kontakti amikojn kaj familianojn loĝantajn en Rusio. Tamen ... ĉio fulme ŝanĝiĝis. Oni vekiĝis kaj ekpaŝis sian ne-facilan vojon al la nova Ukrainio, al sia kompreno, kiel kaj kial Ukrainio ne estas Rusio.

Dankon al la aŭtoro pro la aktuala kaj informplena libro, facile kaj klare verkita pri la teruraj kaj kompleksaj eventoj. Ŝajne ĉiu recenzo devas enhavi ankaŭ ian kritikon. Ĉi-foje mi eĉ ne volas mencii kelkajn mistajpetojn, kiuj cetere tute ne malhelpas la legadon. Iom bedaŭrinde, ke la libron ne eniris fotoj de la intervjuitoj, sed aŭtoro TTT-paĝo, facile trovebla en la reto, havas ilin.

Laste sed ne balaste, la recenzanto dankas pro la listo de la plej gravaj eventoj en la historio de Ukrainio prezentita fine de la libro. Videblas, kian longan historian vojon trapasis Ukrainio ekde la Kijiva Rusio ĝis la nuna tempo. Kaj malgraŭ tio, ke la vojo estas plenplena de obstakloj kaj diversaj problemoj, ni diru la sloganon jam konatan de multaj homoj: „Slava Ukraine! Heroem slava!” („Vivu Ukrainio! Vivu la herooj!”) ■



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Lange Beeldekenstraat 169,
B-2060 Antwerpen, Belgio.
tlf. + 32 3 234 34 00
rete: retbutiko@retbutiko.be
skajpe fel-monato
www.retbutiko.be



Kalle Kniivilä: *Lando kiu vekiĝis. Rakontoj el Ukrainio.*
Eld. Mondial, Novjorko, 2023. 170 paĝoj.
ISBN 978-1-59569-452-2.
Prezo ĉe FEL: 19,60 eŭroj plus afranko.

Kiel pagi vian abonon de **Monato**

Rekte al la eldonejo ...

- ▶ Per via FEL-konto.
- ▶ El Eŭrolando al IBAN-konto de Flandra Esperanto-Ligo, BE66 0000 2653 3843 (BIC-kodo BPOTBEB1), Postbank 1000 Brussel.
- ▶ Per Visa (sed ne Visa Electron) aŭ Mastercard. Sendu la numeron, kontrolnumeron kaj validodaton tra nia sekura servilo: <https://www.esperanto.be/fel/mon/abonilo.php>.
- ▶ Per PayPal al paul_peeraerts@esperanto.be.
- ▶ Per bankĉeko tratita je belga banko en eŭroj. Aldonu 12 eŭrojn pro la bankkostoj. Bv. noti, ke personaj ĉekoj ne plu estas akceptataj en Belgio.

Tarifoj

Ŝtato de la paganto	surface	aere	bite
Argentino	EUR	40	43
Aŭstralio	AUD	109	112
Aŭstrio	EUR	66	68
Belgio	EUR	66	-
Bosnio-Herc.	EUR	40	43
Brazilo	EUR	40	43
Britio	GBP	57	59
Bulgario	EUR	40	43
Ĉeĥio	EUR	56	58
Ĉinio	EUR	40	43
Danio	DKK	490	508
Estonio	EUR	47	49
Finnlando	EUR	66	68
Francio	EUR	66	68
Germanio	EUR	66	68
Grekio	EUR	66	68
Hispanio	EUR	66	68
Hungario	EUR	47	49
Irlando	EUR	66	68
Islando	EUR	66	68
Israelo	EUR	59	62
Italio	EUR	66	68
Japanio	JPY	10400	10800
Kanado	CAD	95	98
Kipro	EUR	56	58
Koreio	EUR	59	62
Kostariko	EUR	40	43
Kroatio	EUR	47	49
Latvio	EUR	47	49
Litovio	EUR	47	49
Luksemburgo	EUR	66	68
Malto	EUR	56	58
Meksiko	EUR	40	43
Nederlando	EUR	66	68
Norvegio	NOK	745	770
Nov-Zelando	NZD	115	120
Pollando	PLN	220	226
Portugalia	EUR	59	62
Rusio	EUR	[40]	[43]
Serbio	EUR	40	43
Slovakio	EUR	47	49
Slovenio	EUR	56	58
Sud-Afriko	EUR	59	62
Svedio	SEK	760	790
Svislando	CHF	82	88
Usono	USD	78	82

aŭ pere de peranto ...

- ▶ **Aŭstra:** Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg. Pĉk. IBAN AT80 6000 0000 0712 7744. Rete: aon.913548977@aon.at.
- ▶ **Belga:** Vlaamse Esperantobond, Lange Beeldekenstraat 169, B-2060 Antwerpen (IBAN BE66 0000 2653 3843 BIC BPOTBEB1). Rete: financo@fel.esperanto.be.
- ▶ **Bosnia kaj hercegovina:** Esperanto-Ligo, Kralja Tvrtka 19 (Pf. 452), 71000 Sarajevo. Konto: 338-900-220-635-2698. Rete: info@esperanto.ba.
- ▶ **Brazila:** Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 301/303, Brasília - DISTRITO FEDERAL, 70393-902. Rete: bel-abonservo@esperanto.org.br.
- ▶ **Ĉeĥa:** Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady III, tel. 723 672 335. Konto banko: Equa bank - 101 953 9617/6100. Rete: polnickypavel@seznam.cz.
- ▶ **Ĉina:** Trezoro Huang Yinbao, Esperanto-Centro, Jingchuan-Xian Jinqiao Guoji, 744300 Pingliang, Ĉinio. Poŝtel.: +86 18893316800. Rete: trezoro@qq.com.
- ▶ **Dana:** Revuservo de DEA, Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. Tv. DK-2100 København Oe. Poŝtel.: +45 21 40 84 87. Rete: arnecasper@yahoo.com.
- ▶ **Estona:** Ahto Siimson, Kastani vk.12-11, Paikuse alev, Pärnu maakond, EE-86602. Rete: ahto.siimson@esperanto.ee.
- ▶ **Finna:** Tiina Kosunen. Rete: cefdelegito@esperanto.fi.
- ▶ **Franca:** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (IBAN FR76 4255 9000 0941 0200 1388 731 BIC CCOPFR-PPXXX). Rete: esperanto-france@esperanto.org.
- ▶ **Germana:** Esperanto-Buchversand Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Str. 9, D-55129 Mainz. Rete: wolfgang.schwanzer@esperanto.de.
- ▶ **Hispana:** Pedro A. Garrote Escribano, C/Las Mercedes, 5-5º-C, 47006 Valladolid. Rete: hisperanto.uea@gmail.com.
- ▶ **Irlanda:** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W. Rete: noviresp@eircom.net.
- ▶ **Islanda:** Islanda Esperanto-Federacio, Pósthólf 1081, IS-101 Reykjavík. Rete: esperant@ismennt.is.
- ▶ **Israela:** Jehoŝua Tilleman, 97-A Derch-Akko, IL-2637324 Kirjat Mockin. Rete: b48705544@013.net. Telephone: (04) 8 70 55 44.
- ▶ **Itala:** Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk.: 37312204). Rete: feisegreteria@esperanto.it.
- ▶ **Japania:** Japania Esperanto-Instituto, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162-0042. Rete: esperanto@jei.or.jp.
- ▶ **Kanada:** Kanada Esperanto-Asocio, p/a Raymond Brisebois, kasisto, 414-110 Grand Ave. London, ON N6C 1L8. Rete: rjlba@yahoo.ca.
- ▶ **Kataluna:** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 1008, E-08204 Sabadell. Rete: perado@esperanto.cat.
- ▶ **Korea:** Korea Esperanto-Asocio, 464-ho, 217 Toegy-ro, Jung-gu, Seulo 04558. Rete: kea@esperanto.or.kr.
- ▶ **Kostarika:** Hugo Mora, Apartado 606-1250, Escazú. Rete: miaumiau@ice.co.cr.
- ▶ **Kroata:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
- ▶ **Litova:** Laimius Stražnickas, LEA, a.k. 178, LT-01003 Vilnius-C, Litovio. Rete: laimiuslt@gmail.com.
- ▶ **Luksemburga:** LEA, 2, om Klaeppchen, 5682 Dalheim (pĉk.: CCPLULL IBAN LU50 1111 0089 3612 0000). Rete: brian.moon@gmx.com.
- ▶ **Norvega:** NEL, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo. Rete: oficejo@esperanto.no.
- ▶ **Nov-Zelanda:** David Ryan, PO Box 3867, Wellington 6140, Nov-Zelando. Rete: ryangomez@xtra.co.nz.
- ▶ **Pola:** Danuta Leyk, ul. Miedzyborska 117 m 8, PL-04-013 Warszawa, konto 06-1020-1156-0000-7102-0036-6328 ĉe PKO BP XV O/Wwa. Rete: dankaleyk@gmail.com.
- ▶ **Portugala:** Portugala Esperanto-Asocio / Associação Portuguesa de Esperanto, Praceta Humberto Delgado, 1-B, Monte Abraão, PT-2745-318 Queluz SNT. Rete: portugala@esperanto.web.pt.
- ▶ **Ruslanda:** Halina Gorecka, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando. Rete: sezonoj@kanet.ru.
- ▶ **Serba:** Zoran Ćirić, Branka Miljkovića 14, 18000 Niš, poŝtel. +381-63-7200 616. Rete: zciric2@gmail.com.
- ▶ **Slovaka:** Peter Baláž - ESPERO, Vitázná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio. Tel. +421 902203369, rete: petro@ikso.net.
- ▶ **Slovena:** Kroata Esperantista Unuiĝo, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb. Rete: marija.belosevic@zg.t-com.hr.
- ▶ **Sud-Afrika:** Colin Beckford, 011 Riverside Place, Alnwick Road, DIEP RIVER, 7800. Rete: cbeckford@telkomsa.net.
- ▶ **Sveda:** Sveda Esperanto-Federacio, c/o Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, SE-931 38 Skellefteå. Rete: svenska@esperantoforbundet.se.
- ▶ **Svisa:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen, ĝirkonto 40-52 612-7 Basel. Rete: ch_scheidegger@bluewin.ch.
- ▶ **Usona:** ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530. Tel.: +1 510 653 0998, Rete: elna@esperanto-usa.org.